

EL POPOLA ĈINIO

中國報道

11
1978





Huangkian-akvokonservejo

*Nova agrikultura
konstruado de Ŝandong*




La popolo de Ŝandong-provinco faris grandskalan agraran konstruadon. Nun, 58 procentoj de la agroj de la provinco estas sub irigacia kaj drena prizorgo kaj triono de ili fariĝis kampoj de stabila alta produktado ne influeblaj de sekeco aŭ troabundeco de pluvo. En la periodo de 1974 ĝis 1977, la produktokvanto de greno de la tuta provinco kreskis meznombro en ĉiu jaro je 6.6%. Ĉisomere, oni venkis la malfavoran veteron de sekeco kaj akiris riĉan rikolton kaj la produktokvanto de greno grandskale pligrandiĝis kompare kun tiu de la pasinta jaro.





Irigaciado per
akvo el putoj



Elektra pumpstacio por
irigaciado per akvo de
la Flava Rivero



La akvedukto de Han'guang, per kiu centoj da hektaroj da kampoj estas irigaciataj per akvo de Venhe-rivero.




Vojo en bone flegata kamparo

Disŝutado de insekticido



Ŝtupaj kampoj konvenaj por irigaciado, drenado kaj kulturado per maŝinoj






Tiu ĉi pumpstacio povas levi akvon al alteco de 44 metroj kaj irigacii ĉ. 7,300 hektarojn da kampoj.






Nova aspekto de vilaĝo kun dragita rivero

Dank' al finkonstruo de Dongĝoŭ-akvokonservejo kaj la akcesoraj instalajoj, ĉ. 8,667 hektaroj da kampoj donos pli grandan produkton.



Dank' al finkonstruo de tiu ĉi akvedukto, ĉ. 1,067 hektaroj da montaj kampoj ricevos irigaciadon.





Guberniaj gvidantoj, komunumaj kadroj kaj membroj kune studas la konstruan planon de pumpstacio.

Komunumaj kaj brigadaj kadroj donas bonan ekzemplon en laboro.



EL POPOLA ĈINIO

中國報通

1978
N-ro II
(242)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

KOVRILO:

- P. 1. Profesoro Ĝeng Ke de la Centra Instituto de Industria Belarto kun siaj gestudentoj en praktikado en porcelana fabriko
- P. 4. Galopantaj Ĉevaloj (ĉinstila pentraĵo) de JIN SOŬSI

Enhavo

Li neniam laciĝas	2
Pri la 63-a Universala Kongreso	6
ESP-NOVAĴOJ: Japanaj EPC-amikoj vizitis Ĉinion	11
Raporto pri la 63-a UK	14
Por la nova longa marŝo	15
Sur la scenejoj de Pekino	18
Mia vizito al Eĝne-hoŝoo	23
Bela kaj riĉa Giaŭdong-duoninsulo	27
KURANTAJ AFEROJ	30, 34
La junulara Palaco de Ŝanhajo	31
Goldbach-konjekto (raportajo)	35
EN PEKINO: Bejhaj-parko	39
AMIKECO: Geamikoj, vizitu min refoje	43
KULTURAJ KONTAKTOJ:	
Kanada fotografia ekspozicio	47
Valoraj donacoj	47
Infana prezenta trupo en Rumanio	47
EL ĈINA MODERNA HISTORIO: La revolucio de 1911	48
KALEJDOSKOPO	50
Antikva urbo Hi-an	51



Li neniam laciĝas

— Pri entomologo kaj esperantisto Prof. Chou Io

KIAM la printempo de sciencoj venis al la tero de nia patrolando, mi lastatempe havis ŝancon reveni al la Nordokcidenta Agromonia Instituto, en kiu mi studis antaŭ pli ol 20 jaroj. En mia patrina lernejo pompis floroj, kaj mi vizitis mian karan esperantan instruiston entomologon Prof. Chou Io.

Prof. Chou Io estas konata entomologo kaj ankaŭ veterana esperantisto de Ĉinio. Li ekleris Esp-on en 1929. Kiam li studis en la lernejo Lida de Sanhajo, li jam komencis aktive partopreni en Esperanta aktivado kaj havis rilaton kun multaj esperantistoj kiel Bakin, Lu Gianpo. Tiutempe, Kamarado Hujucz (la nuna prezidanto




Kolektado de insektoj

de ĈEL) kuraĝigis ilin kaj persone donis lecionojn al ilia Esperanta grupo. Kiam li studis entomologion en universitato, li servigis Esperanton al sia esplorado kaj akcelis la disvolvigon de Esperanto per praktika uzo de Esperanto en esplorado de entomologio. En 1935 li organizis la Asocion de Insekta Intereso en la Nantong-a Agronomia Instituto de Giangsu-provinco, fariĝis ĝia estro kaj la ĉefredaktoro de la “Bulteno de Asocio de Insekta Intereso” kaj tiu de la monata ilustrita gazeto de ĉina entomologio — “Insekto Interesa”. Li aplikis Esperanton sur la kovriloj de tiuj gazetoj kaj al la titoloj de iliaj artikoloj. Li korespondis en Esperanto kun sovetia genetikisto I. V. Miĉurin kaj japana entomologo Esadi Teiso por interŝanĝi sciencajn informojn. Krome, li tradukis la triaktan dramon de la nederlanda pionira esperantisto H. J. Bulthuis “Malriĉa en Spirito” en la ĉinan lingvon. En la somera libertempo de 1936, kun monhelpo de siaj du instruistoj li sola veturis al Italio por studado, kunportante kun si nur Esperanto-Italan Vortaron. Li sin vivtenis tie per verkado kaj samtempe lernis la italan lingvon pere de Esperanto. Post tri monatoj li eniris en la Agronomian Instituton de Napoli-universitato kaj tie studis entomologion duonlaborante kaj duonlernante. Li gajnis tie titolon de doktoro kaj en Napoli li tradukis “Taglibron de Vilaĝpedelo” de St. Blicher de Danlando en la ĉinan lingvon.

Prof. Chou Io naskiĝis en la urbo Ningbo de la marborda Ĝegiang-provinco de sudorienta Ĉinio kaj lernis en Ŝanhajo. La sklavigo kaj subpremado fare de imperiistoj al la ĉina laboranta popolo forte vundis lian junan koron. Dum sia estado en Italio, kvankam li gajnis profundan amikecon de siaj kolegoj, tamen ankaŭ ricevis ofendojn de nemalmultaj nekonatoj pro la tiama malalta pozicio de Ĉinio en la mondo. La agreso de la japanaj militaristoj al Ĉinio plie pikvundis lian koron. Kiel li esperis kontribui sian forton al la patrolando por ĝin glorigi, sed kion li povis fari en la malnova Ĉinio?

Antaŭ la Liberiĝo Prof. Chou Io instruis en la Nordokcidenta Agronomia Instituto, kie li travivis ekstreme malfacilajn jarojn. Li kolek-



En verkado

tis insektajn specimenojn en malriĉeco kaj malsateco, eĉ riskante sian vivon. Ne povante trovi lokon por publikigi siajn disertajojn, li ŝparis monon por aĉeti malgrandan presmaŝinon, mem faris kompostadon, presadon kaj broŝuradon. Sed pro terura inflacio en tiu tempo, la monata salajro de li, kiel universitata profesoro, sufiĉis por aĉeti nur unu rismon da ĵurnala papero. En 1946, sub tiel malfacilaj kondiĉoj Prof. Chou Io, lia intima kunlaboranto Docente Lu Chinsheng kaj aliaj kolegoj starigis Instituton Entomologian de Chou, redaktis kaj eldonis la gazetojn “Entomologio Ĉina”, “Entomologia et Art” kaj “La Informo de Entomologio”, en kiuj ili uzis Esperanton, kaj proklamis: “Tiamaniere, kun Esperanto kiel internacia komunikilo, mi esperas, ke scienco fariĝos vera trezoro de l’ homaro, kaj ke ĝi estos enkondukita en tiun kampon.”

En 1949, fondiĝis la Popola Respubliko de Ĉinio, la longhistoria ĉina nacio akiris novan vivon. Kiel ĝojis Prof. Chou Io! Kun pli alta entuziasmo li sin ĵetis en sciencan esploron, kombinante entomologian esploron kaj produktan praktikon. Komisiite de la agrikultura departemento de la tiama Nordokcidenta Milita kaj Politika Komisiono, li komencis esploron por trovi rimedon de ekstermado de tritika mu-



En 1951, li direktas studentojn en spertizo pri tritikaj muŝetoj en sia hejmo post leciona horo.



En la biblioteko de Napoli-universitato de Italio, en 1937

ŝeto (*Sitodiplosis Mosellana*), kiu serioze influis la tritikan produktadon kaj kaŭzis grandan perdon. Li kaj liaj kolegoj faris esploran vojaĝon tra la tritika regiono de Ŝenhi-provinco, tage kaj nokte penlaboris surkampe kaj en laboratorio, konis la leĝon de estiĝo de tritika muŝeto kaj trovis rimedon por preventi kaj ekstermi ilin. Dank' al tio, en tri jaroj nia lando eliminis seriozan malutilon de tritikaj muŝetoj kaj la produktokvanto de tritiko de la antaŭe plagitaj provincoj plialtiĝis trione. Post la Liberiĝo nia lando eldonis "Revuon Entomologian", "Entomologiajn Sciojn" kaj aliajn gazetojn kaj havis presejon, kaj Prof. Chou Io ne plu bezonas mem zorgi pri presado. Dum la lasta periodo li publikigis 38 disertaĵojn.

Laŭ internacia kutimo, kiam oni nomas iun nove trovitan specon de insekto, oni devas aldoni al ĝia nomo la nomon de la trovinto. Antaŭ la Liberiĝo la ĉina entomologia laboro estis tre postĝinta. Multaj fremdlandaj burĝaj specialistoj forportis al siaj propraj landoj keston post kesto da insektaj specimenoj kolektitaj en nia lando kaj ili tie publikigis disertaĵojn kaj donis nomojn al la trovaĵoj. Ke ĉinaj insektoj portis nomojn de fremdlandaj personoj ja estis granda honto por la ĉinoj. Kaj krome tiuj disertaĵoj estis publikigitaj en diversaj lingvoj, kaj la

tipo-specimenoj troviĝis en alilandaj muzeoj, tio portis grandegajn malfacilojn al niaj entomologoj. En la pasintaj dekoj da jaroj, por glorigi la patrolandon, Prof. Chou Io diligente kolektis insektajn specimenojn, trovis kaj nomis pli ol 40 novajn specojn de insektoj. Dank' al sia longa esplorado, li formis novajn opiniojn de fundamenta teorio pri klasifiko de insektoj. En 1963, li publikigis la artikolon "Kelkaj Opinioj pri Insekta Klasifiko" en kiu li elmetis iom da filozofiaj teorioj pri la klasifikado, establis 32 novajn subordojn kaj 45 superfamiliojn, kaj en 1964 li verkis la libron "Insekta Klasifiko". Post tralego de pli ol 7,000 antikvaj libroj li verkis "Historio pri Frutempa Entomologia Esplorado en Ĉinio", kiu estas la unua libro en la mondo pri la ĉina entomologia historio. Liaj sukcesoj altiris atenton de en- kaj eksterlandaj sciencaj rondoj.

Post la Liberiĝo, Prof. Chou Io ne nur fervore okupiĝis pri scienca esplorado, sed ankaŭ aktive disvastigis Esperanton. Li kaj Docento Lu Chinsheng fondis en la instituto Esperantan kurson kun pli ol cent lernantoj. Samtempe ili fondis la Esperantan gazeton "Verda Gardeno". En 1951, Prof. Chou Io, Lu Chinsheng kaj aliaj 18 scienlistoj publikigis "Alvokon de 20 Sciencistoj Ĉinaj por Esperanto". La alvoko diras: "Ni

volas adopti la simplan, facile lerneblan lingvon internacian, Esperanto, kiel la sciancan lingvon por internacia uzado, kaj publikigi niajn verkojn en ĝi . . ." Ili starigis sciancan interligon kun pli ol 50 sciencistoj kaj institucioj de 15 landoj kaj interŝanĝis disertaĵojn kaj verkojn kun ili. Ili multe uzis Esperanton en korespondo.

En somero de 1966, komenciĝis la Granda Proleta Kultura Revolucio, la okcent-miliona ĉina popolo involviĝis en tiun revolucion tajdon, al kiu ankaŭ Prof. Chou Io sin ĵetis. Li trifoje iris al kamparo por fiziklabora hardado, dank' al kio li plie konis la rilaton inter sia entomologia esplorado kaj la tri grandaj revolucioj de klasa batalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento. Prof. Chou Io estas serioza en scienca esplorado kaj aktive servas al la socialisma konstruado de la patrolando. Li neniam ĉesigis sian esploron eĉ en la tagoj kiam la "kvarpersona bando" ĉie tiranis. En la pasintaj dekoj da jaroj li iris tra la montoj kaj akvoj de la lando por kolekti insektajn specimenojn. En 1974, kun aĝo de pli ol 60 jaroj li venis al Hiŝuangbanna ĉe la sudokcidenta landlimo — kolektejo de belaj papilioj, kaj eniris primitivan arbaron por kolekti insektajn specimenojn. En la pasinteco li ofte eliris kun sia edzino en feriaj tagoj por kolekti insektajn specimenojn. Tiu-okaze li surportis strangajn vestojn kun multaj poŝoj kaj surtalie ankaŭ zonon kun multaj poŝoj por porti insektojn. Eĉ lia irbastono servas al lia kolekta laboro, li povas munti al ĝi insektokaptan reton post forpreno de la metala ingo al ĝia kapo. Reveninte de la kolektado li laboris eĉ pli energie. Dum la tiranado de la "kvarpersona bando", li verkis 20 disertaĵojn.

En ĉijara printempo, kiel avangarda scienca laboranto li ĉeestis la Tutlandan Sciancan Konferencon kunvokitan kaj preziditan de Prezidan-

to Hua Guofeng kaj ricevis de la konferenco honoran diplomon pro siaj elstaraj meritoj. Ankaŭ lia disertaĵo "Esplorado pri Tritika Muŝeto" ricevis honoran diplomon de la konferenco.

La zefiro de scienca printempo faris mian karan instruiston pli juna. Kvankam li estas jam 67-jara, tamen li ankoraŭ laboras tage kaj nokte. Nun, li faris planon rapide fini sian verkadon de "Entomologio" en 7 volumoj, "Ekonomiaj Insektoj de Ŝenhi-provinco kun Koloraj Ilustraĵoj" en 6 volumoj, "La Klasifiko pri Ĉinaj Insektoj" kaj "La Ĉina Entomologia Historio" kaj intencis traduki la lastan en Esperanton. Samtempe kun tio li kulturos nombron da entomologiaj klasikistoj. Li diris: "Mi volas esti homponto en la nova longa marŝo, por ke la juna generacio marŝu antaŭen, transpasinte mian korpon kaj sciencajn barojn!"

D-ro L. L. Zamenhof skribis en sia poemo "La Vojo": "Ni semas kaj semas, neniam laciĝas, . . ." Mia kara Esperanta instruisto Prof. Chou Io agas ĝuste tiamaniere. Jes, li neniam laciĝas.

Parto de la gazetoj redaktitaj de Prof. Chou





de LAŬLUM

Pli ol 4,000 Kongresanoj en Varna

De la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto, 1978, dum pompis floroj en Bulgario, la lando de rozoj, okazis la 63-a Universala Kongreso de Esperanto en ĝia tria urbo Varna.

La Ĉina Esperantista Delegacio, kiu atingis Varnan nokte de la 28-a de julio, estis varme akceptata de la prezidanto kaj laborantoj de LKK tuj post descendo de la aviadilo.

Varna ĉe la bordo de la Nigra Maro estas havenurbo kun historio de ĉirkaŭ 2,000 jaroj. Oni diras, ke en antikveco grekaj komercistoj ekŝatis ĝin kaj turnis ĝin en gravan ekonomian centron. Varna estas urbo kun historiaj vizitindejoj kaj modernaj industrioj. En la kvindekaj jaroj, oni konstruis tie banlokojn sur la plaĝo kaj dekojn da hoteloj kaj sanatorioj, tiel ke Varna fariĝis unu el la turismaj centroj de Bulgario. Dank' al tiaj klopodoj, la antikva havenurbo ricevis novan ĉarmon kaj la kromnoman "Belulino ĉe la Nigra Maro".

Pro la okazo de la 63-a Universala Kongreso, la Palaco de Sporto kaj Kulturo de Varna estis ornamita, gravaj vojkruciĝoj estis dekoraciitaj

per koloraj flagoj kaj la verdstela standardo simbolanta la Esperantan movadon, kaj super stratoj estis pendigitaj rubandoj kun bonvenigaj vortoj Esperantaj al la kongresanoj. Antaŭvespere de la komenciĝo de la Kongreso, inter la 260,000 urbanoj de Varna subite aperis 4,500 esperantistoj, surbruste kun verdstela insigno kaj adres-karteto donitaj de la Kongreso, dank' al kiuj oni povis tuj rimarki, ke ili estas kongresanoj-gastoj. Dum la kongresado de ok tagoj, ĉie en Varna, tiel sur la stratoj, kiel en hoteloj, restoracioj kaj la kunvenejoj, brilis verdaj steloj, ĉie sin trovis homoj kiuj interparolis per la lingvo de D-ro Esperanto por interkompreno kaj amikeco, kaj tio aldonis harmonion al la bela Varna.

La lastaj tagoj de julio kaj la komencaj tagoj de aŭgusto estis en la intensa turisma sezono de Varna, kaj krome la urbo devis akcepti milojn da kongresanoj, tial akriĝis la problemo de loĝado por la gastoj. Tamen ni ricevis, dank' al helpo de bulgaraj amikoj, litĉambrojn en bona hotelo tuj post nia alveno. Ĉar ni sendis niajn aliĝilojn al la Kongreso tre malfrue, niaj nomoj kaj adresoj ne estis presitaj en la Kongresa Libro, tial oni ne povis informiĝi per ĝi, ke inter la kongresanoj troviĝas ĉinoj. Sed ĝuste pro tio

ni spertis apartan surprizan ĝojon. Irante de la hotelo Nigra Maro al la Palaco de Sporto kaj Kulturo, ni devis trapasi la straton Lenin. Paŝante sur la bulvaro, ni ofte renkontis geesperantistojn diverslandajn, kiuj nin salutis. Post “saluton!”, “bonan matenon!” aŭ “bonan tagon!” iuj nin demandis: “Ĉu vi estas el Japanio?” Informiĝinte ke ni estas ĉinoj, iuj tuj ekkriis ĝoje: “Renkontiĝi kun ĉinaj amikoj estas mia plej granda feliĉo!” Iuj petis de ni informojn pri siaj malnovaj konatoj Hujucz, Ĵelezo k.a., aliaj demandis pri la reformado de la ĉina skribolingvo kaj la kultura kaj eduka afero de Ĉinio kaj triaj esprimis sian deziron viziti Ĉinion pro turista intereso.

De la 20-a ĝis la 22-a de la 29-a de julio, okazis interkonatiĝa vespero en la vasta halo de la Palaco de Sporto kaj Kulturo. Kolektiĝis en la kongresejo miloj da gesamideanoj, inter kiuj troviĝis sciencistoj kaj teknikistoj, instruistoj, ĵurnalistoj, fervojistoj, poŝtistoj, kolĥozanoj,



Kamarado Baj Soŭmian (dekstre), politika konsilanto de la ĉina ambasado en Bulgario, faras salutan paroladon al la Kongreso.

studentoj, kuracistoj, emeritoj kaj geknaboj. Ili devenis de landoj kun malsamaj sociaj sistemoj, kaj iliaj religiaj kaj politikaj kredoj estis tre diferencaj. Tamen ili ĉiuj estis ordinaraj popo-

En la kongreso dum la inaŭguro





Kamarado Je Gjun-gian (Cicio Mar, la 1-a de maldekstre en la fronto), membro de la Ĉina Esperantista Delegacio, interparolas kun sia malnova dana amiko D-ro P. Neergaard.

lanoj kaj havis la komunan volon amike kunvivi kun alilandaj popolanoj. Ili kolektiĝis ĉe la marbordo de la Nigra Maro por interkoniĝo, por interkompreno, por amikeco inter popolanoj. Entuziasmaj vizaĝoj renkontiĝis, varmaj manoj kunpremiĝis kaj amikaj vortoj tiel plezurigis milojn da koroj, ke ili sentis kvazaŭ ili renkontus malnovajn konatojn.

Diversaj Aktivadoj

Antaŭtagmeze de la 30-a de julio, la kongresanoj el diversaj landoj torentis en la halon de la kongresejo por solena inaŭguro.

Supre de la podio pendis la giganta verdstela standardo. Ĉe la tablo fronte de ĝi sidis, krom la respondeculoj de UEA kaj LKK, reprezentanto de la ĝenerala direktoro de UNESKO, S-ro P. Tanĉev, la alta protektanto de la UK kaj la unua vicprezidanto de la Ŝtata Konsilantaro de Bulgario, kaj respondeculo de la urbo Varna.

La prezidanto de la Kongreso proklamis malfermon de la Kongreso kaj la orkestro ekludis la muzikon de "La Espero", dum miloj da voĉoj kune disaŭdigis fortan kanton similan al "La Internacio" kaj "Marseljezo":

*En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko;
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko.*

.....

Post la salutaj paroladoj de Vicprezidanto P. Tanĉev kaj la respondeculo de la urbo Varna, diplomataj reprezentantoj de Aŭstrio, Ĉinio, Danlando, Norvegio, Sirio, Svisio k.a. landoj faris salutajn paroladojn por esprimi sian subtenon kaj deziron de sukceso al la Kongreso. Estas menciinde, ke la aŭstra ambasadoro D-ro Bukovski faris sian salutan paroladon en Esperanto, kaj kiam la prezidanto de la Kongreso invitis la ĉinan politikan konsilanton fari parolon, aŭdiĝis varma aplaŭdado en la kunvenejo. La saluto de la ĉina diplomato estis mallonga, tamen kontente akceptita de la ĉeestantaro.

Posttagmeze, daŭre iris la Kongreso. Dekoj da geknaboj de la Infana Kongreseto marŝis antaŭ la podion, svingante verdstelajn flagetojn en sia mano kaj laŭtleĝis salutajn vortojn al la Kongreso per sonoraj voĉoj. Kaj tion sekvis salutaj paroladoj de reprezentantoj de landaj Esperantaj organizoj. La Kongreson salutis en-

tute reprezentantoj de 42 landoj. La tempo difinita de la Kongreso por ĉiu saluta parolado estis 1 minuto, sed nebrideblaj varmaj sentoj devigis plurajn salutantojn transpasi la tempolimon. Tamen neniu plendis pro tio.

La arta vespero de la sekvanta tago daŭris ĝis la noktomezo. Tre multaj kaj diversaj estis la programeroj de la Kongreso. Por partopreni laŭeble en multaj el ili, nia delegacio faris labordividon inter la kvar membroj, tamen ni ja ne povis kapti ĉion. Kiel bone estus, se ni posedus la magian povon multobligi nin por ĉeesti ĉiujn programerojn!

En la ok tagoj okazis fakaj kunvenoj de sciencaj laborantoj, instruistoj, ĵurnalistoj, kuracistoj, juristoj, filologoj, PTT-laborantoj, fervojistoj, muzikistoj, amatoroj de radio, fotografio, magnetofono kaj ŝako, virinoj, gejunuloj, geknaboj kaj blinduloj.

En la kadro de la Internacia Somera Universitato oni donis prelegojn pri pedagogio, teorio de la Esperanta literaturo, matematiko, protektado de balenoj, drogherboj de Eŭropo, komputilaj retoj kaj Esperanto, socia psikologio pri utiligo de ferioj, plantfibroj en manĝaĵoj, prostaglandinoj k.a.

Sufiĉe multaj kaj diversaj estis la artaj aktivadoj. La Bulgara Esperanta Teatro ludis la komedion "Meĝero", la Pola Esperanta Teatro ludis la modernan dramon "Hipnoto" kaj la bulgara pupteatro ludis "La Dormanta Belulino" kaj "Ora Birdo", kaj krome oni ankaŭ aranĝis prezentadon de filmoj, bulgaran vesperon, balon, internacian artan vesperon, koncerton k.a.

Kaj krome, oni aranĝis seminarion pri la Ĉemetodo, tujkurson pri la bulgara lingvo kaj ekskursojn al interesaj lokoj kaj viziton al bulgara kamparo. La buntaj kaj abundaj aktivadoj dum la Kongreso elokvente pruvis, ke plivastigis la aplikado de Esperanto kaj la lingvo mem ricevis rimarkindan disvolviĝon en la praktika uzado.

Sincera Amikeco

La ok-taga kongreso havigis al la partoprenantoj ne nur bonan ŝancon por praktika uzo de Esperanto kaj diskutado pri Esperantaj laboroj, kaj ĝuon de riĉa kultura kaj arta vivo, sed ankaŭ karan kaj sinceran amikecon al multaj el ili.

Ni, kvar geesperantistoj el Ĉinio, ofte estis ĉirkaŭataj de alilandaj geamikoj, el kiuj iuj esprimis sian amzorgon kaj bondezirojn al la ĉina popolo, aliaj parolis pri sia multjara kunla-



Plezura kuniĝo



*Ekskurso al kampo
en ĉirkaŭaĵo de
Varna*

boro kun ĉinaj esperantistoj en la pasinteco, ankaŭ aliaj diris ke ili propagandis per Esperanto la naciliberigan bataladon de Ĉinio en la tridekaj jaroj kaj subtenis la ĉinan revolucionan aferon per sia ago. La prezidanto de la Bulgara Esperantista Asocio diris, ke en la tridekaj jaroj, ili tradukis multajn artikolojn el la gazeto "Ĉinio Hurlas" kaj ilin aperigis en bulgaraj jurnaloj kaj gazetoj. Sinjoro W. Auld, vicprezidanto de UEA diris, ke li estas malnova leganto de "El Popola Ĉinio" kaj bone konservas hejme dudek kelkajn jarkolektojn de la gazeto inkluzive de ĝia unua numero. Li laŭdis nian revuon kaj kuraĝigis nin plibonigi ĝin. Sinjoro S. Milojeviĉ, redaktoro de la organo de UEA "Esperanto", nin demandis sprite, ĉu li povus iam eklabori ĉe la redakcio de "El Popola Ĉinio". Preskaŭ ĉiuj esperantistoj el orienteŭropaj landoj kaj Sovetunio renkontitaj de ni parolis kun ni pri "El Popola Ĉinio" kaj esprimis sian bedaŭron pro neebleco legi ĝin en la lastaj jaroj. Multaj interŝanĝis kun ni memoraĵojn kaj invitis nin iam gastigi ĉe ili. Por ilia profunda amikeco ni kore ilin dankas.

Ni dankas BEA, LKK kaj multajn bulgarajn geesperantistojn kaj popolojn, kiuj amike nin

akceptis kaj fervore nin helpis. Dum la mallonga kontakto kun la bulgara popolo ni ricevis profundan impreson pri ĝia bonkoreco kaj gastamo. Ni ŝuldas dankon al bulgaraj popoloj, ke ni povis travivi la Kongreson kun plezuro.

Finiĝis la Kongreso. Kun bedaŭro pro disiĝo la kongresanoj adiaŭis siajn novajn kaj malnovajn amikojn, promesante revidi unu alian en la 64-a UK en Svislando por interŝanĝi informojn pri siaj sukcesoj en la nova jaro.

Dum la Kongreso, ni havis plurajn okazojn por interŝanĝi opiniojn kun la respondeculoj de UEA, kiuj esprimis, ke ili povos plifortigi sian kunlaboron kun la ĉinaj esperantistoj en pluraj sferoj. Ni tre ĝojas pro tio. Por fari sin vera internacia oragnizo, UEA nun emfazas sian laboron en la disvolviĝantaj landoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko, pliintensigos sian eldonadon de sciencaj kaj teknikaj verkoj en Esperanto, por ke oni povu akiri necesajn sciojn pere de Esperanto, kaj samtempe ĝi daŭre batalos kontraŭ lingva diskriminacio. Ni kredas, ke la nova orientiĝo de la laboro de UEA certe ricevos vastan subtenon kaj la Esperanta movado marŝos de nun per pli grandaj paŝoj.

Japanaj EPĈ-amikoj vizitis Ĉinion

LA Vizitgrupo al Ĉinio de Japanaj Amikoj de El Popola Ĉinio kun S-ro Tokuda Rokuro, peranto de nia gazeto, kiel estro kaj S-ro Umeda Joŝimi kiel sekretario vizitis nian landon de la 18-a de aŭgusto ĝis la 1-a de septembro.

La vizitgrupo havis 12 membrojn, inter kiuj estis 74-jara veterana esperantisto kaj ankaŭ 20-jara juna esperantistino. Ili venis de diversaj lokoj de Japanio kaj malsamaj estas iliaj profesioj, tamen ili estas aŭ peranto aŭ legantoj de nia gazeto.

La vizitgrupo estis varme bonvenigita de Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), la redakcio de El Popola Ĉinio kaj aliaj esperantistoj. En la tagmezo de la 19-a de aŭgusto, Guozi Shudian kaj la redakcio de EPĈ okazigis festenon por varme bonvenigi la japanajn gastojn.

La grupo ankaŭ vizitis Guozi Shudian, la redakcion de El Popola Ĉinio kaj Radion Pekino kaj havis kunsidojn kun ĉinaj samlingvanoj.

En Pekino, la prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo Hujucz okazi-

gis bankedon por bonvenigi la japanajn geamikojn kaj havis kun ili intiman interparolon.

Krom Pekinon, la grupo vizitis Nankinon, Ŝanhajon kaj Hangĝou. En Ŝanhajo, la fame konata verkisto kaj veterana esperantisto Bakin kaj aliaj ŝanhajaj esperantistoj intervidiĝis kun ĉiuj membroj de la vizitgrupo kaj havis kun ili koran interparolon.

La edzo de la fame konata japana esperantistino Verda Majo estis ĉino kaj la paro jam forpasis antaŭlonge. Ĉifoje ankaŭ S-ino Ozaŭa

Ŝaŭ Gongven, estro de Guozi Shudian, Ĉen Juan, ĝenerala sekretario de ĈEL kaj aliaj kun S-ro Tokuda Rokuro kaj la aliaj japanaj geamikoj





S-ro Tokuda Rokuro kaj aliaj en Tajhalo de la Imperiestra Palaco


Juki, la pliĝa fratino de Verda Majo, vizitis Ĉinion kiel membro de la vizitgrupo. En Pekino, ŝi intervidiĝis kun la gefiloj de sia forpasinta fratino, kiuj ne kontaktiĝis kun ŝi en la pasintaj pli ol 30 jaroj kaj nun jam fariĝis plenaĝuloj. La

intervidiĝo tre emociis la ĉinajn kaj japanajn esperantistojn. La merito-plenaj faroj de Verda Majo estas bone konataj de ĉinaj kaj japanaj esperantistoj kaj okupas neforgeseblan paĝon en la historio de la amikeco inter la ĉina kaj japana

popoloj kaj tiu de la interkontaktado de ambaŭlandaj esperantistoj.

En Pekino la grupo esprimis respekton al la restaĵoj de Prezidanto Maŭ, en Nankino vizitis Mejjuanhincun, kie nia forpasinta Ĉefminis-

La pliĝa fratino de Verda Majo S-ino Ozaŭa Juki (meze) kun siaj genevoj (apud ŝi)



Novo Rubriko

“Fotoj pri natura belaĵo”

De la jaro 1979 ni malfermos en nia gazeto novan rubrikon, en kiu ni aperigos fotojn pri natura belaĵo faritajn de ĉinaj aŭ eksterlandaj esperantistoj. Kun la foto (en grandeco proksimume de 6 koloroj) oni bonvolu aldoni klarigon pri la foto. Ni ne resendos la neuzitajn fotojn. Al senditoj de ĉiuj uzitaj fotoj ni rekompencos per donacaĵo aŭ memoraĵo.

Ni atendas kunlaboron de fotamatoroj tra la tuta mondo.

La Redakcio de EPC

tro Ĝoŭ laboris kaj loĝis siatempe. En tiuj kaj aliaj lokoj ili vizitis vidindaĵojn, historiajn restaĵojn, fabrikojn, popolkomunumojn, lernejon kaj infanan domon ktp., kaj ankaŭ spektis pup teatraĵon en Esperanto.

En vespero de la 31-a de aŭgusto, la vizitgrupo okazigis festenon en la Pekina Hotelo, por reciproki la varman akceptadon de la ĉinaj popoloj kaj esperantistoj dum ilia restado en Ĉinio.

En frua mateno de la 1-a de septembro, la vizitgrupo finis sian dusemajnan vizitadon kaj revenis de Pekino al sia patrolando, plene kunportante la amikecon de la ĉina popolo kaj esperantistoj al la japanaj popolo kaj esperantistoj.



(Dekstre) En la Imperiestra Palaco

(Maldekstre): numero de EPC!



Kamarado Ĝang Kiĉeng faras raporton.

Raporto pri la 63-a UK

LASTATEMPE, la Ĉina Esperanto-Ligo okazigis raportkunvenon pri la 63-a UK en Pekino. Sub la prezido de Kiu Gi, membro de la Konstanta Konsilantaro de la Ĉina Esperanto-Ligo, Ĝang Kiĉeng, estro de la Ĉina Esperantista Delegacio al la 63-a UK de Esperanto, faris raporton pri la kongreso.

Ĝang Kiĉeng diris, ke en 1905 pli ol 600 geesperantistoj ĉeestis la Unuan Universalan Kongreson de Esperanto okazigitan en Francio, sed ĉijare la nombro de partoprenantoj al la Kongreso en Bulgario atingis 4,500, malpli ol tiu de la kongreso de la jaro 1923 okazigita en la urbo Nurenbergo de Germanio. Tiu kongreso montras, ke la internacia esperanta movado

havas grandan disvolviĝon kaj Esperanto havas grandan vivipovon.

Li diris daŭre, ke depost la Granda Proleta Kultura Revolucio, la Ĉina Esperanto-Ligo unufoje sendis sian delegacion al la kongreso, tial ĝi ricevis varman akcepton de geesperantistoj de diversaj landoj. Dum la kongreso la gekamaradoj de la ĉina delegacio partoprenis respektive en la kunvenoj pri la problemoj de virino, Esperanta instruado, lingvoj k.a., faris vastan kontakton kaj intiman interparoladon kun geesperantistoj. Precipe ili havis ekstreme intiman intervidiĝon kun malnovaj amikoj. Estas aparte neforgeseble, ke la ĉina delegacio estis varme akceptita de bulgaraj popolaroj kaj esperantistoj. Iliak aktivadoj akcelis la interkompreniĝon kaj amikecon inter la esperantistoj de Ĉinio kaj aliaj landoj.

Li ankaŭ prezentis la nunan aktivadon de UEA. Li diris, ke UEA oponas kontraŭ lingva diskriminacio kaj opinias, ke la diversaj lingvoj devas disvolviĝi en solan lingvon pere de Esperanto, klopodas disvastigi Esperanton en la landoj de la tria mondo kaj turni ĝin en vere internacian lingvon. Ĝi planas multe eldoni esperantajn librojn pri kulturo, eduko, sciencoj kaj teknikoj, por ke Esperanto ludu pli grandan rolon. Ĉio tio havas aktivan signifon.

Pli ol 80 esperantistoj, inkluzive de ĉ. 20 studentoj de la Pekina Lingva Instituto ĉeestis la kunvenon, inter ili sin trovis blankharuloj, gejunuloj kaj komencantoj. La raporto ricevis varman aplaŭdon de la aŭskultantoj kaj finiĝis en kantado de "La Internacio" en Esperanto.

Por la nova longa marŝo

de Niaj Raportistoj

ANTAŬ nelonge okaze de la Financa-Komerca Konferenco por Lerni de Daking kaj Daĝaj en Pekino ni intervjuis reprezentantojn el diversaj lokoj de la tuta lando, kiuj faris, por rapide efektiviĝi la modernigon de la lando, elstarajn kontribuojn sur la frontoj de komerco kaj servado.

POR OPORTUNO DE LA AMASOJ

Por ke popolamasoj pli bone laboru kun bona aranĝo de ĉiutaga vivo, la komerca kaj serva branĉoj de nemalmultaj urboj kaj minejoj faris multajn aranĝojn oportunajn al la amasoj.

Laborantoj de la komerca kaj serva fakoj de Daking-olekampo ĉiam persistas je la principo "utili al la produktado kaj faciligi la vivon" kaj etendas sian servon ĉien kien la olekampo disvolviĝis, instalante butikojn kaj servejojn por la laboristoj kaj oficistoj. Nun, en la loĝkvartaloj de Daking-olekampo troviĝas magazeno kun manĝaj-vendo, grenvendejo, poŝtoficejo, banko, librejo, tajlorejo, barbirejo, banejo, riparejo, infanĝardeno, lernejo, kuracejo, biblioteko ktp., kies servo multe faciligas la vivon de la laboristoj kaj iliaj familianoj. Dum konstruado de novaj olekampoj, la komercaj kaj servaj labo-



Diversaj plado-materialoj en Ŝanhaja legombazaro

rantoj ĝustatempe sendas ĉiutagajn bezonaĵojn al la produkta fronto eĉ en frostaj vintraj tagoj kun temperaturo de 30-40° C sub la nulo.

En la lastaj jaroj, la ŝanhajaj komercaj fakoj senĉese plibonigis la sintenon kaj teknikon de la laborantoj en servado. Nun multaj grenaj kaj kondimentaj butikoj vendas krom grenojn, oleon, salon, sojon, vinagron k.a., ankaŭ pastaĵojn kiel ekzemple ordinaraĵajn vermiĉelojn, sukeraĵajn vermiĉelojn por akuŝintino kaj senalkalajn vermiĉelojn por tiuj kiuj suferas sukeran diabeton. En la urbego estas multaj porvivaj servstacioj, kiuj plenumas servojn de hartondo, flikado de vestoj, riparado de objektoj kaj aliaj ĉ. 30 laboroj. Kaj en legomvendejoj oni aldonis vendotablon de kunmetita materialo por pretaj pladoj, por ke la klientoj akiru la bezonaĵojn sen iro al pluraj lokoj.

La urbo Ĉongking, kiu estis grave malordigita de la "kvarpersona bando", hodiaŭ havas novan fizionomion. La restoraciaj laborantoj de la urbo portas diversajn manĝetaĵojn frue en ĉiu mateno al fabrikoj, stacioj, havenoj, hospitaloj kaj vojkruĉigoj por disvendo, kaj tiel ricevis

laŭdojn de la amasoj. En la plej granda hotelo de la urbo Ŝanĉeng specialaj ĉambroj estas aranĝitaj por virinoj kun infano, en ili estas pretaj vivbezonaĵoj de infanoj, ombreloj kaj galoŝoj pruntepreneblaj por gastoj en bezono, kuracejo, flikejo kaj tizano-preparejo ĉiam pretaj por servi al la gastoj. Tiuj aranĝoj tre plaĉas al la amasoj.

Teknika demonstrado

Iun posttagmezon, en la Pekina Ekspozejo 250 laboristoj de komercaj kaj servaj fakoj de Pekino faris teknikan demonstradon por la reprezentantoj ĉeestantaj la supre nomitan konferencon.

8 kuiristoj en blanka bluzo estis skulptantaj sidante antaŭ sia tableto. Post nelonge ili prezentis al la spektantoj belajn rozojn, freŝajn fruktojn kaj elegantajn grupojn. Kiu ja povis imagi, ke tiuj artaĵoj ĉiuj estis skulptitaj de ili el rafanoj, melongenoj, terpomoj, k.s. legomoj. Inter la kuiristoj troviĝis Li Guoju de la Pekina Hotelo. Li povas skulpti belegan florvazon el diversaj legomoj kaj lia alta tekniko estis laŭdata de fremdlandaj amikoj. Majstro Ĝou Zigie de



Floroj faritaj de kuiristoj el napoj, terpomoj, melongenoj, rafanoj k. s.

la Popola Restoracio estas lerta en farado de delikataj "Drakbarbaj Vermiĉeloj". Li povas fari pli ol 4,000 tre maldikajn striojn de vermiĉeloj el 1.5 kg. da pasto per tirado per la manoj. Tiel faritaj vermiĉeloj estas tre ŝatataj de la klientoj.

En la demonstrado partoprenis ankaŭ multaj gejunuloj, kiuj akiris teknikan lertecon dank' al sia modesta lernado de majstroj kaj diligenta ekzercado. Iu junulino demonstris muntadon de biciklo, ŝi bone finis la muntadon de biciklo kun 37 maŝinpecoj en nur 5 minutoj kaj 35 sekundoj. Kaj alia junulino kun kovritaj okuloj bone distingis per palpado pli ol 350 specojn de drogherboj kaj samtempe diris iliajn produktajn lokojn kaj kuracefikojn. Iu juna kuiristo de Hinkiaŭ-Hotelo faris pladon "Orkoko Staranta sur Sola Piedo", en formo de koko kokerikanta, kiu vekis grandan intereson ĉe la spektantoj pro la originaleco. Antaŭe li faris dekojn da tiaj artismaj pladoj kune kun siaj majstroj kaj per tio aldonis ĉarmon al diversaj festenoj.

Por stimuli altigon de la servokapablo kaj kulture diversajn teknikistojn laŭ la bezono de la modernigo de la lando, ankaŭ la titoloj de teknikaj gradoj en komercaj kaj servaj fakoj estas

restarigitaj. En la unua duono de la kuranta jaro, 500 ekspertoj el la komercejoj, restoracioj kaj servaj fakoj de 14 provincoj kaj urboj de la tuta lando ricevis teknikajn titolojn. Inter ili troviĝas superklasaj kuiristoj, barbiroj, vendistoj, tajloroj, horloĝistoj, fotistoj, ĉinmedicinaj apotekistoj, piedkuracistoj, antikvajistoj ktp.



Restoracio de Tianĝin prenis sur sin la taskon prepari ĉiutagajn tagmanĝaĵojn por infanoj kies gepatroj ne povas prizorgi ilin pro laboro.



Vicdirektoro (meze) de la Unua Magazeno de Sanhajo interŝanĝas laborsper-ton kun aliaj komercaj laborantoj.

Sur la Scenejoj de Pekino

EN kvietaj koncertejoj muzikistoj ludas majestatan simfonion "Heroaj Poemoj", komponitan de la veterana komponisto Ĉen Pejĥjun laŭ poemoj de Prezidanto Maŭ Zedong, kaj nun ludas la Centra Filharmonio en semajnfina koncerto de ili okazigita. Ilia eminenta tekniko rikoltis varman aplaŭdon de la aŭskultantoj.

En alia semajnfina koncerto, la filharmonio ludis «Vltava» el la simfonio «Mia Patrolando» de la ĉeĥoslovaka komponisto Bedrich Smetana, la naŭan simfonion en E minora «El la Nova Mondo» de la ĉeĥoslovaka A. Dvorak, la preludon de la opero «Halka» de la pola komponisto Stanislaw Moniuszko kaj la Pianan Konĉerton en E bemola kaj majora de la hungara komponisto Franz Liszt.

La semajnfina koncerto estis iniciatita de la Centra Filharmonio en 1956, laŭ la literatura kaj arta principo de Prezidanto Maŭ Zedong "floru cent floroj, aŭdigu sin cent skoloj", "utiligu la antikvajn en servo al la nuntempo, utiligu la fremdlandajn en servo al Ĉinio". En la dek jaroj de 1956 ĝis 1966 ĝi faris pli ol 300 prezentadojn al pli ol 300,000 homoj. Tio ludis pozitivan rolon en prosperigo de muzika verkado kaj altigo de la arta nivelo de nia muzikludado. Tiu aktivado estis interrompita pro la subfosado de Lin Biaŭ kaj la "kvarpersona bando". En julio ĉijare la semajnfina koncerto estis rekomencita, kaj tio ricevis varman aprobon de muzikamantoj.

58-jara Luo Kun laboranta en la restoracio Panhi de Kantono estis titolita kiel superklasa majstro de kukoj. Li komencis lerni kukofaradon en sia 14-jara aĝo. Nun li kapablas fari pli ol 1,200 specojn de kukoj ne nur bongustaj sed ankaŭ belaj kun diversaj desegnoj aŭ en formo de vivecaj birdoj, kunikloj, orfiŝoj k.a. Ili ĉiuj ricevis laŭdon en- kaj eksterlande. Superklasa barbiro Jang Bosun de la urbo Hi-an estas tre lerta en diversaj hararanĝoj precipe por virinoj. Li ne nur atentigas studon pri arto kaj estetiko en laborado, sed ankaŭ estas afabla en servado, kaj li estis elektita kiel avangarda laboranto en la pasintaj jaroj. Tajlorino Ju Mejlin de la Virina Kudrejo Hintang de Ŝanhajo lertas tajli laŭkorpe diversajn vestojn kaj kovri la

mankon de korpo de iuj klientoj per zorga aranĝo. Li estas titolita kiel teknikisto de vestoj.

POR MULTE FARI KONTRIBUON

Por ke oni povu labori plenenergie kaj multe kontribui al la modernigo de la lando, nun komercaj kaj servaj fakoj de multaj provincoj kaj urbegoj estas klopodantaj por solvi la problemon de sociigo de dommastrumado inkluzive de kuirado.

En Pekino jam efektiviĝis meĥanizo en preparado de ĉinaj pasteĉoj, vermiĉeloj, *jŭanhjaŭoj* (pasteĉoj el glueca rizo muelita) k.a., tiel ke la kvanto de la vendataj farunaj manĝaĵoj kreskis dekoble. Ankaŭ en aliaj urboj oni ĝenerale me-

Sceno el dramo pri
la heroĝino Jang Kaj-
huj



De printempo ĉijara la ĉinaj muzikistaj rondoj estas tre viglaj. Krom komponado, ili ludis multajn muzikaĵojn ĉinajn kaj alilandajn. En sia piana recitalo en Pekino, pianisto Guo Ĝihong ludis ĉinajn muzikaĵojn kaj la plej influhavajn verkojn de la mondfamaj Betoveno, Ŝopeno kaj

F. Liszt. Li okupiĝas ne nur pri instruado kaj ludado de piana muziko, sed ankaŭ pri verkado de pianaj muzikaĵoj. Li komponis ĉ. 30 pianajn verkojn. La tiranado de la "kvarpersona bando" ĉesigis liajn verkadon kaj ludon je pli ol 10 jaroj.

Ĥanizis la preparadon de vermiĉeloj, *mantoŭoj* (fermenta pastopeco vaporumita) kaj ĉinaj pasteĉoj. Vermičeloj produktataj en Ŝanhajo, Tianĝin kaj Fuĝoŭ manĝeblaj post trempado de 5-6 minutoj en bolanta akvo estas tre bonvenaj por loĝantoj kaj vojaĝantoj.

Rizaj vermiĉeloj estas kutimaj manĝaĵoj de sudaj ĉinoj. Ĝia faruno estas preparita el rizo miksita kun akvo per muelado kaj tiaj vermiĉeloj karakteriziĝas per glateco kaj bongusteco dum manĝado. Aldonante aliajn materialojn al ĝi, oni povas prepari el ĝi 30 specojn de manĝaĵoj. En la urbo Nanning de la Guanghi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono konstruiĝis en la lastaj jaroj 5 produktaj linioj de rizaj vermiĉeloj kiuj povas provizi pli ol 500 fabrikojn,

instituciojn kaj restoraciojn kaj kamparanojn de la antaŭurbo. Nun, la sperto de Nanning estas disvastigata en Guanghi, Guangdong, Hunan, Ĝiangsu kaj aliaj provincoj por kontentigi la bezonon de loĝantoj de suda Ĉinio.

En iuj lokoj oni fondis malgrandan vendejon de manĝaĵoj, manĝejon, infanvartejon, porvivan servstacion. Multaj restoracioj de Pekino kaj Tiangin speciale preparas por lernejan tagmanĝon, por ke iliaj gepatroj liberiĝu de tia zorgo.

"Faru kontribuon por la nova longa marŝo!" estas devizo elmetita de la laborantoj de la komerca kaj serva fronto de nia tuta lando por efektiviĝi la modernigon de Ĉinio kaj ili klopodas efektiviĝi permeson per agoj.



Sceno el la pekina
opero «Ruĝa Lan-
terno»


Sceno el la dramo
«Ruĝa Koro»

Por turni literaturon kaj arton en siajn instru-
mentojn de kontraŭrevoluciaj aktivadoj por
uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato,
la “kvarpersona bando” senbride subfosis la
revolucian literaturan kaj artan linion de Prezi-
danto Maŭ Zedong, kaj strangolis eminentajn
literaturajn kaj artajn verkojn ŝatatajn de la
ĉina popolo. Samtempe ili malpermesis, en nia
lando, progresemajn eminentajn literaturajn kaj
artajn verkojn fremdlandajn. Ili elmetis absurdan
teorion de literatura kaj arta verkado kaj devigis
la literaturajn kaj artajn laborantojn obei ĝin.
Ili eĉ ordonis, ke literaturistoj kaj artistoj kreu
verkojn kontraŭ Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj aliaj
veteranaj proletaraj revoluciistoj kaj tiujn laŭ-
dantajn ilin mem. Multaj verkistoj kaj artistoj,
kiuj rifuzis tion fari, ricevis ilian baton kaj per-
sekuton. Tio kaŭzis malfekundecon al nia lite-
ratura kaj arta verkado kaj monotonecon en la
prezentado sur la scenejoj en longa periodo.



En oktobro de 1976, la kontraŭpartia “kvar-persona bando” estis frakasita, kaj rezulte de tio finiĝis ilia kultura diktaturo. Pompe floranta printempo venis al la literatura kaj arta ĝardeno de Ĉinio. La surscenigitaj artaj prezentadoj estas multspecaj, kun tre diversaj temoj kaj stiloj neniam viditaj dum la tiranado de la “kvarpersona bando”.

Multjare neviditaj operoj revenis al la scenejo. Inter ili troviĝas la unua ĉina revolucia opero «Blankhara Knabino», kiu temas pri la kontraŭstaro de kamparanoj al subpremo de bienuloj; «Liu Hulan» pri heroino en la periodo de nia Liberiga Milito; «Fratino Giang» pri persista kaj brava batalo de tiu heroino en malamika koncentrejo antaŭvespere de la Liberiĝo kaj «Aĵiguri» pri la vivo de ĉina nacimalplimulto. Aĵiguri estis ĥalĥaza sklavino antaŭ la Liberiĝo. Ŝi estis elektita kiel la unua estrino de produkta brigado sur la Hingiang-a Stepo post la Liberiĝo, gvidis paŝtistojn fari kolektivitan produktadon kaj malkaŝi la subfosadon de malamikoj kontraŭ la brutobreda produktado. La opero prikantas socialismajn pensojn kaj morojn.



Sceno el «Lotusflora Danco»

Inter la surscenigitaj programeroj troviĝas ankoraŭ la jenaj: la pekina opero «Premite al Liangŝan por Ribeli», kiu iam ricevis altan takson de Prezidanto Maŭ Zedong, korektis la fakton de kamparana ribelo torditan de feŭdaj regantoj en la ĉina historio kaj fariĝis komenco de la revolucio al la ĉinaj malnovaj operoj; la historia dramo «Caj Vengi» verkita de la antaŭnelonge forpasinta eminenta proletara kultura batalanto Guo Moĵuo en 1958, en kiu la verkisto ĝuste taksis la historian kontribuon de la Vejregna reĝo Caŭ Caŭ en la Periodo de Tri Regnoj (de 220 ĝis 280 p. K.) kaj prikantis lian grandan rolon en disvolvo de la ĉina kulturo; la tradicia pekina opero en komedia stilo «Brava Ĉambristino», prikantanta ĉambristinon Jang Pajfeng, kiu elpaŝis kaj repuŝis la agresantojn komandante soldatojn, kiam la nacio alfrontis danĝeron. Ĝi montras, ke la pleboj estas la plej saĝaj.





Sceno el la dramo
«Jurnalknaboj»

Danco estas unu el la artoj plej ŝatataj de nia popolo. Sursceniĝas ankaŭ «Lotusflora Danco» kaj «Pava Danco» kun alta nivelo, kiuj estis multjare neludataj. La Ensemblo de Orientaj Dancoj kaj Kantoj, kiu estis malorganizita laŭ ordono de la arbitra Giang King, rapide sursceniĝis popolajn muzikaĵojn kaj dancojn de aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj landoj post restarigo. Ili estas la korea lirika danco «Riĉa Rikolto de Pomoj», la japana «Kanto Jagi» montranta ĝojon de la japana laboranta popolo, la bengala entuziasma kaj gaja «Piedtintila Danco», la argentina danco «Altebenaja Festo» montranta la argentinan popolan vivon kaj la popola kanto de usonaj negroj «Rivero Maljunulo», ktp.

Printempe de la kuranta jaro la Centra Opera kaj Baleta Ensemblo prezentis fragmenton el la franca baletto «La Piratoj» kaj la Pekina Danca Lernejo prezentis baletan «Knabino kun Alumetoj» adaptitan laŭ la samnoma fabelo de la 19-jarcenta dana verkisto Andersen.

En frosta vespero de Kristnaska tago, knabino solece iradas sur stratoj kun fasko da alumetoj en la mano por disvendo. Sed ŝi trovis ne unu aĉetanton nek unu simpatian rigardon. En ne-



El la danco «Tekolektistinoj kaj Papilio»

eltenebla malvarmo ŝi pensas pri varma fajro. En revo de la knabino aperas varma fajrolumo, bongusta ansera rostajo, granda briletanta kristnaska arbo kaj la kara patrino (avineto en la origino). Pasis la nokto. La knabino restas por ĉiam «dormanta» sur frosta tero.

«Fabelojn de Andersen» ĉinigi la ĉina tradukisto Je Gjungan (Cicio Mar). Li estas esperan-

tisto kaj membro de la konstanta komitato de la Ĉina Esperanto-Ligo. En la lasta tagdeko de julio ĉijare, li ĉeestis la 63-an Universalan Kongreson de Esperanto okazigitan en Bulgario.

Post la faligo de la "kvarpersona bando", multaj novaj kaj bonaj teatraĵoj aperis sur la scenejoj de Pekino. Ekz., la dramo «Jang Kajhuj» pri la organizado de kampana movado fare de Prezidanto Maŭ kaj lia edzino Jang Kajhuj; la porinfana dramo «Ĵurnalknaboj» pri gvidado de Kamarado Ĝoŭ Enlaj al ĵurnalknaboj de Hinhua-ĵurnalo, kiuj faris sagacan kaj bravan batalon kontraŭ kuomintangaj reakciuloj en Ĉongking; la dramo «Ruĝa Koro» pri batalo de maljuna ĉinmedicinisto kontraŭ la "kvarpersona bando", en esplorado de nova medikamento kontraŭ koronaria malsano; la satira komedio «Kiam Acerfolioj Ruĝas» pri malkaŝo de la "kvarpersona bando"; la pekina opero «Flago de Ĉuang-

vang» pri la kampana ribelo gvidita de Li Ziĉeng en la 17-a jarcento.

Krom prezentado de profesiaj teatraĵoj, la Kultura Buroo de Pekino okazigis amatoran artan festivalon de ĉefurbaj laboristoj kaj oficistoj, en kiu partoprenis pli ol 240 grupoj de amatoraj artistoj kaj prezentis pli ol 300 programerojn. Tio multe vigligis la kulturan vivon de la vastaj amasoj.

En ĉijara printempo, la franca ŝtata televida kompanio elsendis per satelito al la francaj spektatoroj parton de jenaj artaj programeroj de Ĉinio: La unua paragrafo «Tajdo en la Koro» el la simfonio «Heroaj Poemoj», la piana koncerto «Batalo kontraŭ Tajfuno», la preludo «Lá Roma Karnavalo» de H. Berlioz, la Simfonio n-ro 3 (Eroika) de Betoveno kaj fragmentoj el la franca baletto «La Piratoj».

BAJLONG:

Mia vizito al Eĝne-ĥoŝoo

ĈISOMERE, mi faris interesan vojaĝon al Eĝne-ĥoŝoo (=gubernio) de Gansu-provinco. Nia aŭto ekveturis de Langoŭ, transkuris Vukiaŭ-montĉenon altan je 4,000 metroj kaj eniris la Koridoron Okcidente de la Flava Rivero abundan je akvoj kaj herboj. Poste ĝi kuris plu okcidenten laŭ Kilian-montaro. Trapasinte la urbon Giukjuan, ĝi sin direktis norden, trapasis la oazon Ginta kaj eniris la vastegan Gobion. En tiu vastaĵo tre raraj verdajoj kaj loĝantoj, kaj dum veturado de 330 kilometroj la aŭto antaŭenpuŝiĝis kvazaŭ soleca boato en maro. Post 6-hora veturado ekde Ginta, ni atingis la administrejon de Eĝne-ĥoŝoo.

Kvankam Eĝne-ĥoŝoo estas loko nekonata por multaj homoj, tamen tiu regiono estis fama en la historio.

Restaĵo de alarma brulsignalejo de Han-dinastio





La antikva Nigra Urbo de la Okcidenta Hia-dinastio

Han-dinastiaj skribaĵoj trovitaj ĉe Gjujan

En sia fama verko pri vojaĝado, la itala vojaĝisto Marko Polo de la 13-a jarcento skribis pri tiu loko jene: “Ni forlasis la urbon Ganĝoŭ (nun Ĝangje), rajdis sur ĉevaloj 12 tagojn kaj atingis la urbon Etzina. . . En tiu loko ni pretigis por ni manĝprovizon por 40 tagoj por trairi la senhoman vastan dezerton.” Kaj tiu Etzina estas ĝuste Hejĉengzi (Nigra Urbo) en proksimumo de Eĝne. Tamen tiu loko pli famiĝis pro tio, ke oni trovis tie lignajn latetojn kun surskribaĵoj de Han-dinastio.

La baseno de Eĝne-rivero estis nomata Gjujan en Han-dinastio. Tie estis vasta Gobio kun sola trairebla vojo sur la bordoj de tiu rivero kaj pro tio tiu regiono fariĝis natura ŝirmo al la Silka Vojo, kiu ligis Ĉinion kun okcidentaj landoj. En tiu tempo, la oazo de Gjujan havis fekundan teron kun abundaj akvo kaj herboj kaj tre taŭgis por paŝtado kaj terkulturo. Tial, antaŭ 2,000 jaroj ĝi jam fariĝis loko konkerinda en militoj de antikvaj ĉinaj naciecoj. La regantoj de Han-dinastio (206 a. K. — 220 p.K.) kaj hunaj mastrosinjoroj plurfoje interbatalis pro ĝi. Dum la regado de la imperiestro Vudi de la Okcidenta Han-dinastio (140 — 87 a.K.), oni konstruis grandskale militajn instalaĵojn en tiu loko, kaj lokis tie terkulturajn kaj garnizonajn trupojn.

Laŭlonge de Eĝne-rivero, oni konstruis grandan muron kaj militalarmajn brulsignalejojn por sin defendi kontraŭ invado de hunaj kavalerioj. Tiu stato daŭris du tutaj jarcentojn, tial hodiaŭ en tiu regiono ankoraŭ konserviĝas restaĵoj de granda muro kaj alarmaj brulsignalejoj kaj skribaĵ-latetoj de Han-dinastio. Antaŭ la Liberiĝo, oni elterigis tie pli ol dek mil skribaĵ-latetojn de Han-dinastio, sed tiuj valoregaj historiaj objektoj estis eksterlanden forportitaj de Kuomintango. Dum la periodo de 1972 ĝis 1976, la ŝtata arkeologia taĉmento al Gjujan organizita de koncernaj institucioj elterigis en tiu loko ĉ. dudek mil skribaĵ-latetojn de Han-dinastio, kaj plej multe ĉe la fortresoj de Han-dinastio Poĉengzi je 24 kilometroj sudoriente de Eĝne-hoŝoo kaj Ŝuangĉengzi proksime de Dinghin. Ĉifoje ni vizitis Poĉengzi, kiu estas citadelo ortangula kun longeco de ĉ. 50 metroj kaj larĝeco de ĉ. 70 metroj. Ĝia ĉirkaŭmuro estas masonita el tri tavoloj da adoboj kaj unu tavolo de fibroza ĉiĉi-herbo (*Achratherum splendens*). Laŭ noto sur elterigitaj skribaĵ-latetoj de Han-dinastio, en tiu malvasta citadelo loĝadis unu el la komandantoj de la garnizonaj trupoj ĉe Gjujan antaŭ du mil jaroj. Kaj ni trovis en ĝi fragmentojn de Han-dinastia fajencaĵo kun ŝnura desegno kiel unu el ĝiaj karakterizaĵoj.

La skribaĵ-latetoj de Han-dinastio estas maldikaj latetoj kun longeco de 30 centimetroj kaj

larĝeco de 1 centimetro, uzataj antaŭ du mil jaroj kiel papero. La materialoj por tiaj latetoj estis krom ligno kaj bambuo ankaŭ branĉoj de ruĝa saliko produktata de tiu loko. En tiu tempo, la dekretoj, raportoj, leteroj kaj notoj kaj eĉ la teksto de lernolibroj devis esti skribitaj sur tiaj latetoj. Kvankam la eltrovitaj skribaj-latetoj trapasis du mil jarojn, tamen pro sekeco de tiea klimato ili ankoraŭ restas kompletaj.

La nombro de la lastatempe elterigitaj skribaj-latetoj de Han-dinastio estas la plej granda en nia arkeologia historio. Ilia enhavo estas tre riĉa kaj inkludas dekretojn, terkulturan kaj garnizonan sistemon, nomumon kaj eksigon de oficistoj, armea disciplinon, premiadon, punadon, oficajn leterojn, aktojn, armeajn nomlistojn, klarigojn pri armiloj, soldaj kaj proviantaj kontolibroj, protokolojn de krimulaj konfesoj ktp. La temoj pritraktataj tuŝis la sferojn de politiko, ekonomio, militaj aferoj, kulturo, sciencoj, teknikoj, juro, filozofio, religio kaj nacio, ili estas granda kronika materialo de Han-dinastio. Tiu materialo estas nun ordigata kaj studata de ĉinaj arkeologiaj laborantoj.

La Granda Muro de Han-dinastio

Dum nia vojaĝo laŭlonge de Eĝne-rivero, la plej ofte viditaj historiaj restaĵoj estis tiuj de la Granda Muro de Han-dinastio kaj militarmaj brulsignalejoj. Krom en Gjujan-regiono, ankaŭ

en la regiono de la Koridoro Okcidente de la Flava Rivero ĝis Jumenguan-pasejo troviĝis tiaj militaj konstruaĵoj. Bone konservata parto de la Granda Muro de Han-dinastio troviĝas proksime de Jumenguan-pasejo. Ĝia restaĵo altas je 2.6 metroj kaj larĝas je 3 metroj ĉe la bazo. Same kiel la Granda Muro, ankaŭ la terasoj por milita alarmo estis konstruitaj el ĉiĉi-herbo kaj leŭso. Laŭlonge de la 300-kilometra Eĝne-rivero troviĝas restaĵo de la Granda Muro de Han-dinastio. La distanco inter la alarmaj brulsignalejaj terasoj estas ĝenerale unu aŭ du mil metroj. Apud iuj terasoj ankoraŭ restas brulligno. La terasoj estas konstruitaj sur altaj pozicioj oportunaj por observado kaj gardado. Oni povas klare vidi, ke la gravaj citadeloj kaj lokoj kun abundo da akvo kaj herboj estis protektataj de la Granda Muro. Estas imageble, ke antaŭ dumil jaroj, kiam deĵoranta soldato ekvidis hunan kavalerion, li tuj bruligis alarman fajron sur la signala teraso por sciigi aliajn pri la danĝero tage per la fumo kaj nokte per la lumo, kaj tion rimarkinte la najbaraj gardantoj tuj faris la samon kaj tiamaniere komandantoj en la postfronto povis rapide informiĝi pri la situacio, doni ordonojn kaj sendi trupojn laŭ bezono sen granda hasto.

La Granda Muro estis plej frue riparita kaj konstruita dum la periodo de la Unua Imperiestro de Kin-dinastio (221 — 210 a.K.). Ĝi komenciĝis ĉe Lintaŭ (nun Minhian-gubernio de Gansu-provinco), serpentumis sur Jinŝan-mon-



Restaĵo de la Granda Muro de Han-dinastio


taro en la nordo, kaj finiĝis en la orienta parto de Liaŭning-provinco. Ĝiaj restaĵoj estas troveblaj ankoraŭ nun.

La Granda Muro mondfama, kiu komenciĝas okcidente ĉe Giajuguan-pasejo kaj finiĝas ĉe Ŝanhajguan-pasejo, estis konstruita en Ming-dinastio (1368 — 1644 p. K.), do je ĉ. mil jaroj pli malfrue ol tiu de Han-dinastio.

La Nigra Urbo

En la meza tagdeko de junio, la temperaturo de Eĝne-hoŝoo subite altiĝis ĝis 41.6°C, kaj la jara precipitata kvanto de tiu loko estas nur pli ol 30 milimetroj. Por eviti la bruligan sunon, ni ekveturis al la Nigra Urbo en frua mateno. Tiu antikva urbeto droniĝanta en dezerto altiris al si atenton de la mondo ne pro tio, ke Marko Polo ĝin menciis en sia libro, sed pro tio, ke en la komenco de la 19-a jarcento, imperiisto de la cara Rusio Kolonelo Kozlov kaj la brita imperiisto Aurel Stein plurfoje enŝteliĝis al tiu loko kaj forrabis de tie grandan kvanton da aktoj kaj sutroj de la Okcidenta Hia-dinastio (1038—1227 p.K.), aktoj en la hana ligvo, papermono de Juan-dinastio (1271 — 1368 p.K.) kaj aliaj valoregaj historiaj restaĵoj.

La Nigra Urbo troviĝas je 30 kilometroj sud-oriente de Eĝne-hoŝoo. Tamen la aŭto devis transpasi la senakvan Donghe-riveron larĝan je duona kilometro, veturi zigzage tra sablomontetoj kun ruĝaj salikoj kaj flusablo, kaj post trihora veturado ni vidis de malproksime la Nigran Urbon starantan en la dezerto. La urbo longas 440 metrojn kaj larĝas 370 metrojn. La restaĵo de ĝia ĉirkaŭmuro altas je 9.2 metroj kun dikeco je 11.6 metroj ĉe la bazo kaj 3.7 metroj ĉe la supro. La muro estas formita el tero per ramado kaj hodiaŭ ankoraŭ restas tre impona, kvankam ĉ. mil jarojn ĝi jam trapasis. Aparte okulfrapa estas la tera pagodo bone konservata ĉe la nordokcidenta angulo, kiu fariĝis speciala signo de la urbo. La ĉirkaŭmuro estas preskaŭ englutita de flusablo. Ĉiuj konstruaĵoj en ĝi jam detruigis, tamen klare videblaj estas iliaj ruiniĝintaj muroj. Ekster la nordokcidenta kaj sudokcidenta anguloj de la urbo troviĝas restaĵoj de kelkaj konstruaĵoj. En fendo de la pagodo ĉe




Lignaj latetoj kun surskribaĵoj de Han-dinastio

la nordokcidenta angulo, ni trovis plurajn argilajn pagodetojn kun budhaj statuoj kaj kupran moneron de la regperiodo Ĝiping (1064 — 1067 p.K.) de Song-dinastio. En la urbo, oni trovis fragmentojn de porcelanaĵo, bronzan zonhokon, lignan kombilon, vitrajn globojn, retobalaston kaj kuprajn monerojn de Juan-dinastio (1271 — 1368 p.K.). Ĉe ruino de ŝtata oficejo laŭ konjekto, oni trovis fragmentojn de akto de Juan-dinastio, ties legebla teksto entenas vortojn signifantajn “Ĝenerala Administrejo de Etsizina” kaj “la 19-a jaro de la regperiodo Ĝiĝeng” (t.e. 1359 p.K.). Ekstere de la urbo, troviĝas post-signoj de vasta kamparo, irigaciaj kanaletoj kaj putoj. Sur la tero restas ŝtonaj mueliloj, porcelanaj fragmentoj, feraj objektoj kaj kupraj moneroj. Tio plene pruvas, ke antaŭ 1,000 ĝis 2,000 jaroj, en la oazo de Gjujan troviĝis vasta kamparo kaj multaj domoj, sed poste sekigis aŭ translokiĝis la rivero, dezertigis la loko pro manko de akvo kaj la loĝantoj devis forlasi la urbon. En la vasta dezerto de Eĝne-hoŝoo, la samo okazis al pluraj aliaj antikvaj urboj.



Mateno sur maro



Angulo de Vejhaj-haveno




Bela golfo




Fruktoabunda Taŭgiakuang-brigado



Popola komunumo Sidaŭ



Tombejo de revoluciaj martiroj



La historia restaĵo
Penglaj-turo

LIU SAŬBAJ:

Bela kaj riĉa Giaŭdong-duoninsulo

SUR la mapo de Ĉinio, Ŝandong-provinco similas al kaŭre akvotrinkanta kamelo, kiu etendas sian longan kolon orienten inter la Flavan Maron kaj Bohaj-maron. Kaj tiun longan kolon oni nomas Giaŭdong-duoninsulo. Pli ol 95% de la areo de Giaŭdong-duoninsulo apartenas al Jantaj-subprovinco de Ŝandong-provinco. Tiu regiono kun areo de ĉirkaŭ 23,000 kvadrataj kilometroj havas 9,200,000 loĝantojn.

Jantaj-subprovinco plejparte sidas en montetaro, kiu altas 200-500 metrojn super la mara nivelo. Iuj el ĝiaj ĉefaj montpintoj altas ĉirkaŭ

1,000 metrojn. La tuta regiono estas kun oceana klimato, en somero ne turmentas brula varmego kaj vintre ne tranĉa frosto. Pro la relative alta tereno kaj plena sunbrilo, la loko estas taŭga por kreskado de multaj agrikulturaj plantoj kaj fruktarboj.

La verda maro brakumas Giaŭdong-duoninsulon kun marbordo longa je 1,500 kilometroj. Sur la marbordo estas ora strando, koloraj ovosimilaj ŝtonetoj kaj rifoĵoj. Sur la maro, rebrilas en la suno vitraj flosiloj, kiuj estis fiksitaj per fostoj por kulturi laminarion; kaj senĉese veturas tien



Metiartajoj el lokaj materialoj

kaj reen fiŝkaptaj, pasaĝeraj kaj varaj ŝipoj. En multaj lokoj de la marbordo oni konstruis arbozonojn kontraŭ vento kaj sablo.

Sur la duoninsulo la montpintojn kovras verdaj pinoj kaj cipresoj, la monttaliojn ornamas densaj fruktarboj kaj ĉe la montpiedoj vidiĝas ŝtuparaj kampoj kaj reto de irigaciaj kanaloj kaj ĉie regas viveca atmosfero.

Giaŭdong-duoninsulo produktas ĉefe grenojn kaj oledonajn plantojn en agrikulturo. Ankaŭ ĝiaj metiartaĵoj estas fame konataj. Frue en la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno antaŭ pli ol 2,000 jaroj, oni jam disvolvis tie fiŝkaptadon kaj salpreparadon. Poste, la Unua Imperiestro de Kin-dinastio unuigis Ĉinion kaj trifoje inspektis Giaŭdong-duoninsulon, kaj tie starigis templojn kaj memorŝtonojn kaj kaptis fiŝojn per sagoj. La plenaj tekstoj de la memorŝtonoj troviĝas en la artikolo «Pri la Unua Imperiestro de Kin-dinastio» en la «Historia Kroniko», kiu estas fame konata historia verko de Ĉinio.

La gubernia urbo Penglaj sidas ĉe montpiedo apud la marbordo de Bohaj. Oni diras, ke norde de ĝi sur la maro estis tri «Pengjing-aj Feaj Insuloj», sur kiuj troviĝis montoj plenaj je floroj kaj fruktarboj kaj klaraj fontoj. Se iu ordinara homo venis tien, li povis fariĝi senmortulo. Poste sur la kruta klifo kiu vizaĝas al la maro norde de la urbeto, oni konstruis Penglaj-turon, kiun vizitis multaj turistoj de diversaj dinastioj.

Sur la vasta marsurfaco apud Penglaj-turo troviĝas loko, kie Ki Giguang, fame konata generalo de Ming-dinastio, iam ekzercis mararmeon kaj rezistis kontraŭ invado de piratoj. Sed en la meza periodo de la 19-a jarcento, la putra registaro de King-dinastio jam tute ne povis rezisti kontraŭ la kanonaj militŝipoj de okcidentaj kapitalistaj landoj kaj ili facile rompis la defendan linion kaj profunde invadis ĉinan teritorion. En 1858, Ĉinio estis devigita subskribi la Tiangin-an Traktaton kaj malfermi Jantaj kaj aliajn kvar kiel komercajn havenojn. Ekde tiam la Jantaj-a popolo suferis nacian subpremadon dum preskaŭ 100 jaroj. Super Jantaj flertis la naciaj flagoj de 17 landoj, fremdaj diplomatoj kaj komercistoj monopoligis tiean merkaton, dumpingis komercaĵojn, forprenis krudajn materialojn kaj metiartaĵojn kaj forrabis grandan kvanton da riĉaĵoj.

Nun la marborda urbo Jantaj ŝanĝiĝis de la antaŭa duonkolonia komerca urbo en produktan urbon kun relative kompleta industria sistemo. La industria produktovaloro de Jantaj, la urbeto Vejhaj kaj diversaj gubernioj jam konsistigas pli ol duonon de la totala produktovaloro industria kaj agrikultura de la subprovinco. En la lastaj jaroj oni konstruis en la Jantaj-a Haveno kajon por 10,000-tonela ŝipo, kaj la kvanto de la en-kaj el-portitaj varoj kreskis per 21-oblo kompare kun tiu de la komenca periodo post la fondiĝo de la nova Ĉinio. Ĝia fervojo jam etendiĝis ĝis

Sur draŝejo



Gelaboristoj de ole-pumpila fabriko de Huanghian ekzamenas produktajn.



la marbordo. Jantaj jam havas facilan trafikon surakve kaj surtere.

En la subprovinco troviĝas la avangardaj brigadoj en lernado de Daĝaj Hiadinggia kaj Dajudaŭ fame konataj tra la tuta lando. La antaŭa ŝanĝis siajn dezertajn montojn kaj sterilan teron en belajn montojn plenajn de floroj kaj fruktaroj kaj altproduktajn kampojn kun hektara produktokvanto de greno de ĉ. 15 tunoj. La lasta estas fiŝista vilaĝo kun aspekto de urbeto, kiu havas ŝipriparejon, kiu povas munti fiŝŝipon de 135 ĉevalpovoj. La loĝantoj okupas sin per fiŝkaptado kaj kulturo de laminario.

La supre menciitaj lokoj bone spegulas la prosperiĝon de Jantaj-subprovinco.

Antaŭ la fondiĝo de la nova Ĉinio, Jantaj-subprovinco ne povis produkti sufiĉe da greno por propra bezono, la hektara produktokvanto atingis nur 1252 kilogramojn, kaj krome plejparto de la tieaj manĝaĵoj estis batatoj. Nun, dank' al penema luktado, reformado de la naturo, agrikultura meĥanikigo kaj scienca kultivado, la tuta subprovinco ĉefe produktas tritikon kaj maizon kaj la hektara produktokvanto de greno atingis 6 tunojn kaj fariĝis avangarda regiono en norda Ĉinio. Antaŭe tiu loko multe produktis arakidojn kaj nun ĉiujare ankoraŭ liveras

tion grandkvante al la en- kaj eksterlanda merkatoj.

Sur la marborda linio de Jantaj-subprovinco troviĝas la fiŝkaptado de Jantaj, Vejhaj, Ŝidaŭ, Longkoŭ k.a., kiuj abunde produktas fiŝojn, salikokojn, holoturiojn, haliotojn, ventumilkonkojn (*Chlamys farreri*) kaj aliajn. La salikokoj el Bohaj-marĉo estas tre bongustaj. La kaptokvanto de salikokoj de la fiŝkaptado vizaĝantaj al la maro Bohaj konsistigas pli ol trionon de la totala kaptokvanto de salikokoj de la tuta lando. En la komenca periodo post la fondiĝo de la nova Ĉinio, tie oni sukcesis kulturi laminarion, nun oni jam povas kulturi ankaŭ salikokojn, ventumilkonkojn, mitulojn kaj aliajn marajn animalojn. Kaj la totala enspezo de marakva kulturado konsistigas pli ol du kvinonojn de la totala enspezo de la tuta subprovinco. En la lastaj dek kelkaj jaroj, la scienca instituto de Jantaj-subprovinco akiris relative avangardajn fruktojn en esploro pri la genera vivkutimo de salikokoj, teorio pri kulturado de laminario en profunda rapidflua maro kaj en arta kulturado de dua generacio de holoturio, kaj ludis aktivan rolon en disvolvado de fiŝprodukto.

Metiartajoj de Jantaj, kiel ekzemple ajuraj tukoj kaj pajlaj plektaĵoj, ĝuas bonan reputacion

en la internacia merkato. La ajuraj tuko estas uzataj kiel buŝtuko, tablotuko, litkovrilo, kovrilo de dorsapogilo de sofo kaj tuko sub tetrinkiloj ktp. Iuj el tiaj tuko havas brodaĵon el helkolora fadeno sur helkolora fono kaj aspektas elegante; aliaj blankaj tuko estas ornamitaj per enplektitaj desegnoj el helruĝaj aŭ helverdaj fadenoj kaj tre plaĉas al la okuloj. La mankorboj, skatoloj por fruktoj, kusenoj sub tetrinkiloj, seĝkusenoj kaj aliaj plektitaj el involukroj de maizo, tritika pajlo kaj sovaĝaj herboj en ora aŭ blanka koloro, plejparte ornamitaj per simplaj desegnoj, estas belaj, malpezaj, malkaraj kaj fortikaj. Tiuj du specoj de metiartaĵoj estas gravaj flankokupaj produktaĵoj de la kamparanoj de Jantaj-subprovinco. La komunumoj kaj brigadoj ĉiujare povas enspezi ĉirkaŭ cent milionojn da juanoj de tio. Hodiaŭ Jantaj-subprovinco eksportas ne nur arakidojn, delikatajn vermiĉelojn el amelo, intestan membranon, pomojn kaj pirojn kaj aliajn agrikulturajn kaj flankokupajn produktaĵojn, sed ankaŭ produktaĵojn de malpeza kaj peza indus-

trioj, kiuj konsistigis pli ol trionon de la totala valoro de la eksportaĵoj.

Senĉese disvolviĝas la produktado, senĉese altiĝas la popola vivo. Por ĉiam forpasis la malriĉeco de la kamparanoj antaŭ la fondiĝo de la nova Ĉinio kiam la duono de ilia manĝaĵo konsistis el brano kaj herboj. Anstataŭ batatoj, tritiko kaj maizo jam fariĝis ilia ĉefa nutraĵo. Ĉu en urbo aŭ en kamparo kemia fibraĵo jam fariĝis iliaj ĉefaj vestaĵoj. Horloĝo, biciklo kaj radioricevilo jam estas vaste uzataj de kamparanoj. Multaj kamparanoj nun iras bicikle anstataŭ piede al kampo por labori. Ankaŭ la loĝkondiĉo pliboniĝas tagon post tago tiel en urboj kiel en kamparo. En urboj la ŝtato konstruis grandan nombron da novaj loĝejoj kaj nur prenas de la loĝantoj malmultan lupagon. En la kamparo ĉiu familio ĝenerale havas korton kun kvar brikdomoj. La trafiko inter la urboj kaj kamparo estas facila kaj ĉiuj komunumoj de tiu subprovinco estas atingeblaj por aŭtoj.



ANTIKA ŜTALA SPADO TROVITA EN HUNAN- PROVINCO

Laŭ esplorado pri la ŝtala spado trovita en Ĉangŝa, ĉefurbo de Hunan-provinco, ĉinaj arkeologoj opinias, ke la ĉina afinacio de ŝtalo naskiĝis almenaŭ en la malfrua Periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770-476 a. K.).

La spado estis trovita de la arkeologia trupo de la Muzeo de Hunan-provinco el la 65-a tombo de Janggiaŝan. Laŭ la formoj de

la elterigitaj fajencaĵoj kaj iliaj ornamaj desegnoj, oni konstatis ke la tombo estis en la malfrua Periodo de Printempo kaj Aŭtuno.

La spado longas je 38.4 centimetroj, larĝas je 2.26 centimetroj, dorse dikas je 0.7 centimetro. La spada pinto estis difektita de rustiĝo kaj la tenilo longas 7.8 centimetrojn.

Oni povas vidi la forĝadon sur sekco de la spado. Analizado pruvis ke la spado estis farita el ŝtalo entenanta 0.5-0.6% karbono tra hardado kaj denove alttemperatura forĝo.

BUTIKO DE ANTIKVAĴOJ EN ŜANHAJO


Lastatempe, la Ŝanhaja Amikeca Magazeno, kiu speciale servas al fremdlandaj gastoj, starigis butikon por vendi antikvaĵojn. Ĝi vendas pli ol 25,300 specojn da antikvaĵoj kaj artaĵoj imitaj al antikvaĵoj. Inter ili troviĝas perlaĵ kaj gemaj ornamaĵoj, eburaj skulptaĵoj, jadaĵoj,

bronzaj imitaj al antikvaĵoj, pallsandraj ekranoj, tradiciaj ĉinaj papero, inko, penikoj kaj ŝtonaj inkfrotplatoj; delikataj porcelanaj teletoj, kestetoj, boteloj kaj aliaj; diversaj pentraĵoj, brodaĵoj, eburaj kaj jadaĵoj skulptaĵoj, ŝtonaj, lignaj kaj bambuaj skulptaĵoj kaj gravuraĵoj kun enhavo de verkoj de fame konataj pentristoj de ĉinaj pasintaj dinastioj.

ELDONIĜIS LA VERKARO DE ŜEKSPIRO EN LA ĈINA LINGVO

Lastatempe, la «Verkaro de Ŝekspiro» estis eldonita de la Popola Literatura Eldonejo kaj distribuita tra la tuta lando.

En 1954, la Popola Literatura Eldonejo eldonis «Dramaron de Ŝekspiro» en 12 volumoj, kiun ĉinigiis Ĝu Ŝenghaŭ. Ĉifoje oni faris al ĝi sisteman revizion kaj aldonis la ses historiajn dramojn mankantajn en ĝi kaj lian poemaron. La verkaro konsistas el 11 volumoj.



La Junulara Palaco de Ŝanhajo

La junulara Palaco de Ŝanhajo

de HONG JING

EN la Junulara Palaco de Ŝanhajo regas vigleco, la senĉesa fluo de gejunuloj, kiuj venas partopreni diversajn aktivadojn, donas al ĝi fortan vivecon.

Ĝi estas unu el la plej homplenaj lokoj de la tuta urbo. Ordinare, ĉiutage la lokon vizitas pli ol 10,000 gejunuloj por partopreni ian aktivadon. En festotagoj kaj ferioj la nombro multiĝas ĝis ĉ. 40,000. Kaj tiu loko vere fariĝas mondo de gejunuloj.

Antaŭe varieteejo “Granda Mondo”

La loko antaŭe estis la fama “Granda Mondo”, mondo sub regado de diabloj kaj amuzejo de Ŝanhajo fondita de kaj servanta al burokratoj, kapitalistoj kaj bienuloj. Tiam, oni ĝin nomis “Paradizo de Aventuristoj”. Maljuna laboristo

Sun Genŝou, kiu tie laboris 40 tutajn jarojn kaj propraokule vidis ĉion, rakontis al mi pri la ŝanĝiĝo de la “Granda Mondo” al la “Junulara Palaco”.

Kiam la 20-jara Sun Genŝou venis de la kamparo al la “plej granda amuzejo de Ĉinio” por labori kiel purigisto antaŭ 40 jaroj, la abundaj malvirtaĵoj en la amuzejo terure frapis la simplan vilaĝanon. Ĉe la enirejo oni unue vidis la ridigajn spegulojn, kiuj groteske deformigis homan figuron ĝis monstreco. Sur scenejoj abundis fiaj malĉastaj scenoj kaj filmaj prezentaĵoj. Kaj la hazardludaj ĉambroj estis plenaj de vetludantoj, svarmis publikulinoj, apaĉoj, ŝtelistoj kaj similaj.

Pli poste, Sun Genŝou trovis, ke la imperiistoj kaj la reakciuloj de Kuomintango ankaŭ uzis la

lokon por fari kontraŭrevoluciajn terorajn fiagojn. Ili subaĉetis la mastron de la "Granda Mondo" kaj liajn subulojn por okazigi tie kontraŭkomunismajn kunvenojn, aresti patriotojn kaj murdi kontraŭjapanajn partizanojn. Antaŭvespere de la Liberiĝo, la spionoj de Kuomintango eĉ fondis specialan grupon por kolekti informojn pri aktivado de progresemluloj.

La "Granda Mondo" estis miniatura bildo de la malnova Ŝanhajo.

Post la Liberiĝo, la popola registaro transformis ĝin en veran amuzejon por la popolo. Poste, laŭ la peto de la ŝanhaja junularo la Urba Komitato de la Komunisma Junulara Ligo de Ŝanhajo fondis tie la Junularan Palacon, kiu oficiale malfermiĝis en oktobro de 1974. De tiam, ĝi fariĝis loko por fari komunisman edukadon al gejunuloj kaj tie gejunuloj povas disvolvi dum libertempo aktivadojn artajn, sciencajn, teknikajn kaj gimnastikajn.

Kolororiĉa aktivado

La Junulara Palaco kun plankosurfaco de 16,000 kvadrataj metroj havas 14 halojn uzatajn por ekspoziciejo, biblioteko, ludoĉambro, tablo-


tenisa kaj danca ekzercejoj, teatro ktp. En la centra placo troviĝas la ronda subĉiela scenejo, kie junaj laboristoj, studentoj aŭ junaj intelektuloj en la kamparo ofte venis por fari prezentaĵojn. Plejparto de iliaj prezentaĵoj kutime estas kreitaj de ili mem. En la Junulara Festo de la 4-a de Majo ĉi-jare oni invitis maljunan ruĝarmeanon Huang Po, maljunan scienciston Su Buckingham, filman aktorinon Baj Jang, maljunan modelon de tekstila industrio Ji Ŝigjuan kaj elstaran instruistinon Gaŭ Junhua ĉi-tien por spekti kun pli ol 8,000 gejunuloj prezentadon de kantoj, dancoj, muzikaĵoj, teatraĵoj kaj komedietoj ktp. La varieteon el ĉirkaŭ 100 eroj plenumis profesiaj kaj amatoraj artistoj. Lernantoj de universitatoj kaj mezlernejoj de Ŝanhajo kontribuis en ĝi per grandtipa poemdeklamado de multaj personoj kaj kantado kun gestado por entuziasme prikanti la Ĝeneralan Taskon de la Nova Periodo elmetitan de Prezidanto Hua kaj manifesti sian heroan kaj altan rolon plirapidigi la efektivigon de la 4 modernigoj de nia lando.

Aparte interesaj estis la vidaĵoj en la halo sur la dua etaĝo¹, en kiu estas ekspoziciataj kaj demonstrataj multaj modeloj elektre funkciigataj. Tio elmontris la sciojn de gejunuloj kaj la atin-

La pentrarta grupo



La danco-grupo en ekzercado



gojn de industrio kaj agrikulturo de la tuta lando. Inter ili estis modelo montranta vojon trapasitan de la Ruĝa Armeo dum la "Longa Marŝo". Kiam gejunuloj laŭvice premis la butonojn, la modelo tuj montris korekte per elektra lumo la itineron trapasitan kaj laŭvice la lokojn kie okazis gravaj heroaj bataloj aŭ troviĝis danĝeraj punktoj dum la Longa Marŝo, ekzemple pri la transpaso de Luding-ponto, de neĝaj montoj kaj de marĉa herbejo ktp. Kiam oni premis klavojn por eltaji la vortojn "sendependeco kaj memdecido kaj sinapogo sur propraj fortoj", elstariĝis sur la ebena modelo de la kolor-televizia turo nove konstruita en Ŝanhajo. Kiam oni forte tiris ion similan al fortomezurilo, tuj formiĝis bildo el modelpartoj precize montranta la scenon pri novaj atingoj de Daking-olekampo aŭ de la fervojo Ĉengdu-Kunming ktp. La mekanizitaj modeloj estis tiel strikte ligitaj kun la atingoj de konstruado, ke tio instigis la gejunulojn al revo pri strebo al sciencaj kaj teknikaj studoj por la socialisma patrolando.

En la palaco funkcias diversaj kursoj de piano, akordiono, violono, erhuo², bambua fluto, danco, kanto, komponado ktp., por doni favorajn kondiĉojn al junuloj por disvolvi iliajn specialajn

La elektra grupo



kapablojn. Sub la instruado de Gin Jueling, kiu komponis la infanan kanton "Mi Amas Tiananmen-pordegon de Pekino", la lernantoj de la muzika kurso rapide progresis kaj jam verkis bonajn komponaĵojn. La juna gvidanto de la danca kurso rabotisto Li Ĝengven partoprenis en la aktivado ekde la fondiĝo de la palaco kaj poste estis invitita kiel oficiala gvidanto de la danca kurso. En la lasta tempo, kune kun la kursanoj li kreis novajn dancojn kaj ekzercis la kursanojn kaj ili partoprenis en la prezentado en la varietea kunveno de "Printempo de Ŝanhajo". Tiuj kursoj ankaŭ kulturis kaj liveris novajn personojn al diversaj profesiaj ensembloj.

Diligentaj kaj lernemaj gejunuloj

En la tria etaĝo de la domo mi trovis bibliotekon, en kies legoĉambro multaj gejunuloj legis librojn kaj gazetojn. Multaj el tiuj legantoj estis tiel lernemaj ke ili ofte venis frue kaj foriris malfrue. Mi proksimiĝis al la servotablo kaj trovis iun knabinon, kiu ĵus pruntis libron pri filozofio.


Ŝi abiturientiĝis en 1968 kaj ne povis daŭrigi studadon pro suferado de renito kaj hepatito. En la komenco, ŝi tre ĉagreniĝis pensante pri sia estonteco pro la kronikaj malsanoj. Kiam iom pliboniĝis ŝia farto post ripozado kaj kuraco, ŝi ekpartoprenis en aktivado de la Junulara Palaco. Tie ŝi refoje legis la libron "Kiel Hardiĝis la Ŝtalo" verkita de Ostrovski. La revolucia spirito kaj sentenco de la heroo Pavel Korĉagin multe kuraĝigis ŝin. De tiam, ŝi unuflanke batalis kontraŭ la malsanoj kaj aliflanke penas memlerni. Dum dek jaroj ŝi finis sian studon pri matematiko, fiziko, kemio kaj la angla kaj rusa lingvoj, kiujn devis studi altlernejaj studentoj kaj krome lernis elementajn sciojn pri altenergia fiziko. En la lastaj jaroj, sub la direktado de maljunaj sciencistoj ŝi elemente studis la korpusklon J/ψ nove trovitan. Ŝi jam publikigis iujn disertaciojn en gazetoj.

Nun, laŭ la bezonoj de la Ĝenerala Tasko por la Nova Periodo, la Junulara Palaco de Ŝanhajo ankaŭ fondis diversajn kursojn kaj studrondojn pri sciencoj kaj teknikoj kaj aranĝas ekspoziciojn por konigi sciojn bezonatajn. La kurso pri

lasero fondita antaŭ nelonge estas aparte bona por gejunuloj.

Juna laboristo Liang Julong de la Ŝanhaja Fabriko de Horloĝaj Maŝinpartoj, partoprenanto de laser-kurso, aplikis la teknikon lernitan en veldado en fabrikado de horloĝaj maŝinpartoj kune kun maljunaj laboristoj. Dank' al tio la laborefiko 4-oble altiĝis. Nun Liang Julong entuziasmiĝis pri teknika renovigado kaj klopodas krei linion de aŭtomata produktado de horloĝaj maŝinpartoj.

Post la partoprenado de postlabora interŝanĝado de sciencaj kaj teknikaj spertoj en la Junulara Palaco, teknikisto Ĝang Ĉenĝiang de Riglila Fabriko decidis kontribui per siaj teknikaj konoj al socialisma konstruado. Li sukcesis konstrui, en postlaboraj horoj, aŭtomaton por pritrakti mon-transsendojn por la poŝtoficejo, kaj post nelonge li ankaŭ konstruis aŭtomaton por ŝtofo kun volvado por la Unua Magazeno de Ŝanhajo kaj estas laŭdita de la vastaj amasoj. Ĉijare, li honore ĉeestis la Sciencan kaj Teknikan Kunvenon de Ŝanhajo.



Recenzado de libroj en la biblioteko

1. *Laŭ ĉina kutimo oni nomas la teran etaĝon la unua, la etaĝo tuj super la teretaĝo estas nomata la dua, laŭvice supren estas la tria, kvara ktp. Ni ne sekvas la eŭropan kutimon, kiu estas nek logika nek oportuna. Pri tio ni petas la atenton de niaj legantoj por ne konfuziĝi.*

2. *Ĉina dukorda arĉa instrumento.*



UNUA SIMPOZIO PRI EKSTERLANDA EDUKO EN ĈINIO

La nomita simpozio okazis julie en la Pekina Pedagogia Universitato.

La simpozio daŭris dek tagojn kaj ĝin ĉeestis pli ol 40 personoj, inkluzive de specialistoj, profesoroj sin okupantaj pri esploro de eksterlanda eduko kaj gvidantoj de edu-

kaj, sciencaj, teknikaj kaj eldonejaj fakoj.

En la simpozio oni deklamis akademian raportojn pri eksterlandaj edukaj problemoj kaj varme diskutis problemojn pri divido de ordinara mezlernejoj en literaturan kaj natursciencajn klasojn, eduko al geniaj lernantoj kaj altrapida disvolvado de altgrada eduko.

La simpozio decidis, ke la du libroj «Ĝenerala Stato de Eduko de Diversaj Landoj» kaj «Pri Mondfamaj Universitatoj» kompilitaj de kvar altgradaj lernejoj estos eldonitaj en la venonta jaro.

AMO SUR ŜANHAJA SCENEJO

Unuakta komedio «Amrendevuo», kiu prenas amon kiel la temon, nun prezentiĝas sur ŝanhaja scenejo kaj ricevis varman bonvenon inter junaj laboristoj kaj studentoj.

La heroo en la komedio Liu Min estas juna kaj esperiga sciencisto. Li fervore sin okupas pri esploro de komputero. Antaŭe li ne konis bibliotekistino Lu Jun. Ili hazarde

konatiĝis en kvieta parko, kiam ili atendas respektive sian amikino kaj amikon. Ili havas bonan impreson kaj respekton unu al la alia pro deziro pri konstruado de la patrolando kaj serioza sinteno pri la laboro kaj vivo. Amo burĝoniĝas inter ili. Aliaj du gejunuloj Malgranda Ĉen kaj Aj Li, kiuj estas amiko kaj amikino atendataj de ili, ricevis bonvolajn mokojn kaj kritikojn en la komedio. Malgranda Ĉen kaj Aj Li rigardas monon, rangon kaj belecon kiel ĉefajn kondiĉojn en amafero. Tial ili estas rifuzitaj respektive de sia amikino kaj amiko kaj devis reveni ĉagrene.

Goldbach-konjekto

(raportaĵo)

(Daŭrigo)

POR kompreni kio estas Goldbach-konjekto, oni bezonas nur restudi la aritmetikon lernitan en la tria klaso de elementa lernejo. La ciferoj 1,2,3,4,5, kaj unuoj, dekoj, centoj, miloj kaj dekmiloj nomiĝas pozitivaj entjeroj. La nombroj divideblaj per 2 nomiĝas paraj nombroj kaj la restaj neparaj nombroj. Kaj troviĝas aliaj nombroj kiel ekzemple 2,3,5,7,11,13, ktp., kiuj estas divideblaj nur per 1 kaj si mem sed ne aliaj, nomiĝas primoj, kaj tiuj nombroj kiel 4,6,8,9,10,12, ktp. kiuj estas divideblaj ne nur per 1 kaj si mem sed ankaŭ per aliaj entjeroj nomiĝas komponitaj nombroj. Se unu entjero estas dividebla per unu primo, tiu primo nomiĝas do prima faktoro de la entjero. Ekz. 6 enhavas du primajn faktorojn 2 kaj 3, kaj 30 — 2, 3 kaj 5. Nu, tio ĉi jam sufiĉas.

En 1742, en sia letero al Euler, Goldbach montris, ke ĉiu para nombro ne malpli granda ol 6 enhavas sumon de du primoj. Ekz., $6=3+3$, kaj $24=11+13$, ktp. Oni faris tian ekzamenon al ĉiu para nombro unu post alia ĝis 330,000,000 kaj ties rezulto pruvis la konjekton ĝusta. Sed kiel estas pri la pli grandaj kaj multe pli grandaj nombroj? La konjekto devas esti pruvita, tamen malfacile, malfacilege.

Neniu en la 18-a jarcento povis ĝin pruvi.

Ankaŭ neniu en la 19-a jarcento.

Kaj nur en la dudekaj jaroj de la 20-a jarcento, la afero iom progresis.

Jam antaŭlonge oni volis pruvi, ke ĉiu granda para nombro estas sumo de du nombroj kun ne tiel multaj primaj faktoroj. Per tio ili volis

aranĝi sieĝon por iom post iom pruvi, ke la konjekto de Goldbach unu primo plus unu primo ($1+1$) estas ĝusta.

En la jaro 1920, norvega matematikisto Brun pruvis per antikva kribra metodo — unu el la metodoj por studi teorion de nombroj: Ĉiu granda para nombro estas sumo de du nombroj kun malpli ol 9 primaj faktoroj. Brun pruvis, ke produto de naŭ primaj faktoroj plus la produto de naŭ primaj faktoroj, ($9+9$), estas ĝusta. Tio estis frukto akirita per kribra metodo. Sed tiam la sieĝa cirklo estis ankoraŭ tre granda kaj ĝi devis esti malgrandigita.

Dum la periodo de 1924 ĝis 1958, ĉinaj kaj alilandaj matematikistoj iom post iom pruvis ($7+7$), ($6+6$), ($5+5$), ($4+4$), ($3+3$) kaj ($2+3$). La sieĝa cirklo pli kaj pli malgrandiĝis proksimiĝante al ($1+1$). Sed, al ĉiuj faritaj pruvoj estis unu manko, ke neniu el la du nombroj povis esti difinita kiel primo.

En 1948, hungara matematikisto Renyi aranĝis alian sieĝon, malfermis alian batalkampon por pruvi, ke ĉiu granda para nombro estas sumo de unu primo plus alia nombro kun malpli ol 6 primaj faktoroj. Kaj li fine pruvis ($1+6$).

Sed neniun progreson oni akiris en la postaj dek jaroj.

En 1962, ĉina matematikisto kaj lekcianto de Ŝandong-Universitato Pan Ĉengdong pruvis ($1+5$) kaj tiel faris unu paŝon antaŭen, kaj li kaj Vang Juan pruvis ($1+4$) en la sama jaro. En 1965, matematikistoj Buhŝtab, Vinogradov kaj Richert pruvis ($1+3$).

En majo de 1966, kvazaŭ brila stelo leviĝanta sur la ĉielo de matematiko, K-do Ĉen Gingjun proklamis, en la 17-a numero de Scienca Bulteno eldonata de la Ĉina Akademio de Sciencoj, ke li jam pruvis $(1+2)$.

Post kiam K-do Ĉen Gingjun estis elektita kaj sendita al la Matematika Instituto, la burĝonoj de lia talento kaj saĝo ekfloris unu post alia. En la problemoj de latisa punkto en cirklo kaj de latisa punkto en sfero, Waring-a problemo, divida problemo de tri dimensioj k.a. li plibonigis la rezultojn de ĉinaj kaj alilandaj matematikistoj. Sole per tiuj sukcesoj, li jam faris multajn kontribuojn.

Kiam li ekposedis efektivan fundamenton, li tuj marŝis kun mirinda obstineco al Goldbach-konjekto. Li faris grandan kvanton da kalkulado eĉ forgesante manĝadon kaj dormadon. Li tiel energie dediĉis sian tutan koron al matematiko, ke li fariĝis eĉ ignorema al aliaj aferoj. Foje, li mem koliziis kun arbo kaj demandis kiu tuŝegis lin. Li donis sian tutan saĝon kaj racion al la solvado de tiu ĉi malfacila problemo. Pro tio li multege pagis. Profunde kaviĝis lia okulparo kaj aperis sur liaj vangoj ruĝo de ftizo. Li pene iris sur la malebena montvojeteto de matematiko per malfacilaj paŝoj, kaj li grimpadis sur la krutaĵoj en altebenaĵo de abstrakta penso. Li de tempo al tempo sentis sin tute elĉerpita, sed li ankoraŭ faris suprengrimpadon. Multfoje li ascendis kaj falis, li eĉ ne povis kalkuli kiom da fojoj li malvenkis. Sed li ne perdis la kuraĝon. La manuskriptaj paperoj kovris la teron unu post alia kvazaŭ flugantaj neĝblokoj. Ciferoj, signoj lemoj, formuloj, logikoj, deduktoj amasiĝis sur la planko je alteco de unu metro. Kaj subite ili fariĝis montoj sub la genuoj kaj sennombraj lotusfloroj. Li finfine suriris la nepre irotan vojon al la montpinto kaj surgrimpis la ŝtupon de $(1+2)$.

Li pruvis tiun ĉi problemon kaj skribis longan tezon de pli ol 200 paĝoj.

Profesoro Min Sihe atente tralegis la manuskripton de la tezo. Post fojrefoja ekzamenado kaj kontrolado li asertis, ke lia pruvo estas ĝusta kaj fidinda. Li diris al Ĉen Gingjun, ke en la pasinta jaro oni pruvis $(1+3)$ per granda kaj

altrapida elektrona komputero, tamen en sia pruvado de $(1+2)$ li faris kalkuladon nur per si mem. Tute nemirinde estis ke la tezo estas tro longa, kaj li proponis ĝin mallongigi.

Kiam li estis revizianta sian longan tezon, li estis abrupte kaptita de la torentego de la politika revolucio. La neniam en la historio okazinta Granda Proleta Kultura Revolucio eksplodis kvazaŭ spiritaj atom- kaj hidro-bomboj sukcese eksperimentitaj unu post alia sur la tero de Ĉinio.

V.

La Granda Proleta Kultura Revolucio estis granda politika revolucio. La ruzega burĝaro devis fari, ĉe murangulo, mortan barakton kontraŭ ĝi por sin savi. Neniam en la homa historio okazis tiel granda amasa movado. La kvarono de la tuta homaro, sen distingo de la seksoj kaj aĝoj, mobiliziĝis. La superba revolucio enrulis ĉiujn, ĉu laboristojn, kamparanojn, soldatojn, aliajn laborantajn amasojn kaj intelektulojn, ĉu sanktulojn kaj demonojn. Denunci kaj esti denunciata, malkaŝi kaj esti malkaŝata, kritiki kaj esti kritikata kaj memkritiki. Ĉiuj estis tuŝitaj je la animo kaj la malpuraĵoj akumulitaj dum tri mil jaroj devis esti forlavitaj. Nia vivo vigliĝis kaj granda kvanto da mallumaj objektoj en la vivo malkaŝiĝis per si mem. Skorioj surakviĝis kaj estis facile ilin forigi. La ĉefaj flankoj kaj brilaj flankoj de nia socialisma socio disradiis, dum la malutileco de mallumaj objektoj pli evidentiĝis.

La historio estis skribita paĝon post paĝo, kaj pri la praveco kaj malpraveco de ĉefaj problemoj oni fine trovis komunan opinionon.

K-do Ĉen Gingjun ricevis plej severan provon en la Granda Proleta Kultura Revolucio. Tiam la veteranaj matematikistoj suferis atakojn, kaj same ankaŭ la mezaĝaj kaj junaj. Tumulteco regis la majestan akademion de sciencoj, kaj en la antaŭe bolantaj laboratorioj regis silento. Estis ĉiam akraj disputoj en tagoj kaj noktoj. La Granda Proleta Kultura Revolucio estis kvazaŭ kribrilo, kiu kribris ĉion. Tio estis ankaŭ kribra metodo, kiu ellasis la forigendajn sed neniel la neellasendajn.

Oni iam emfazis, ke sciencaj laborantoj devas teniĝi al sia laboro kaj tutkore okupiĝi pri sia faka studo. Kaj K-do Ĉen Gingjun estis taksita kiel tipo de plenumantoj de tiu t. n. burĝa sciencesplora linio. Jes, li tuttage nur studis kaj studadis. Li malofte zorgis pri politiko tamen partoprenis en ĉiuj antaŭaj politikaj movadoj. La Kompartio estas bona, Kuomintango malbona, tian simplan veron li tre bone konis. La logiko de matematikistoj estas malmola kiel ŝtalo, kaj lia starpunkto estas firma. Li neniam faris eraron en tio. Kaj en politika historio li estas tiel pura kaj blanka kiel gruo, sur kies plumoj neblas aldoni makulon. Li iam iris al fabrikoj por tie labori kaj uzi la matematikon en servo al produktado, kvankam li estas specialisto pri la baza teoria scienco, teorio pri nombroj.

Miskompreno kun neniuj malbona intenco estas facile korektebla. Ankaŭ moko pro nescio estas pardonebla. Por kritiki matematikiston, oni devas minimume iom koni la karakterojn de matematiko, alie ili eĉ ne sciis kian babilaĉon ili elverŝas. K-do Ĉen estis kritikita kaj kulpiĝita pri diversaj krimoj kiel "reviziisma ido", "tipo de blanka specialisto", "idioto" ktp. Aŭdiĝis eĉ tia sensencaĵo: Tiu ĉi homo studis la problemon $(1+2)$, la matematikon nekompreblan. Al diablo la Goldbach-konjekto! Kio eksterordinara estas en la problemo $(1+2)$? Ĉu tio ne egalas al 3? Tiu homo enŝteliĝis en la Matematikan Instituton, ricevadas ŝtatan salajron kaj prenante manĝon de la popolo li studas tian problemaĉon $1+2=3!$ Falsa scienco!

La parolinto mem ja montris sin idioto.

Estas kompreneble, se tion diris homo kiu ne sciis matematikon. Tamen inter la parolintoj troviĝis evidente homoj kiuj sciis matematikon kaj eĉ sciis la mondfaman problemon de Goldbach-konjekto. Do, tio estis malica kalumnio.

VI.

Post kiam Prezidanto Maŭ decidis sendi laboristan propagandan taĉmenton al universitatoj kaj institutoj de la Akademio de Sciencoj, K-do Ĉen Gingjun denove povis ne nur studi sed ankaŭ kalkuli. Sed ankoraŭ troviĝis iuj kiuj ne

volis lasi lin libera. Ĉiutage, ili venis frapi je lia pordo kaj kontroli la loĝantojn, ke li ne povis trankvile legi kaj studi. Iufoje ili venis kun tenajlo, tranĉis kaj forportis la lampon en lia ĉambro, kaj eĉ fortondis la ŝnureton de la tirŝaltilo, por ke li ne povu legi.

Do mallumo falis en lian koron.

Dum la evento de la 13-a de septembro la granda konspirulo Lin Biaŭ finludis sian rolon kaj mortis hontindan morton. Informiĝinte pri tio, Ĉen Gingjun estis tiel mirigita, ke li apenaŭ povis diri ion. Poste lia situacio iom post iom boniĝis, kaj li refoje sin jetis al la studado pri Goldbach-konjekto. La biblioteka administranto, kiu estis esploranto antaŭe, varme subtenis lin. Efektive, troviĝis multaj varmaj subtenantoj. Ili bone traktis kaj patronis lin. Li estis kaŝita en profunda angulo de libroŝtalo por dediĉi sin al studo. Dank' al persisto de tiuj esplorantoj la matematika instituto plu abonis kaj aĉetis diverslandajn literaturojn kaj materialojn. Li legis, kalkulis kaj pensis, kaj iom post iom li vigliĝis, tamen lia sanstato des pli malboniĝis. Li tion ne diris nek zorgis. Tage li ĉiam restis en tiu angulo kaj nokte sub kerosena lampo. Li rekomencis grimpadon. Li grimpis kaj grimpadis por trovi senerare la plej mallongan kaj facilan vojon al la supro.

Ĉefministro Ĝoŭ ĉiam zorgis pri la laboro de la Akademio de Sciencoj kaj volis forigi la intervenon de burĝa partio. Antaŭ duonmonato, iu pli maljuna kamaradino nomata Ĝoŭ estis enoficigita kiel estrino de politika fako de la Matematika Instituto. La sekcio de kvin sciencaj studoj inkluzive de analiza kaj algebra teorioj pri nombroj restarigis la sistemon de fiksa laborhoraro. Kaj krome kiel sekretario de la partia filio estis nomumita veterana baza kadro laboristkampano-devena.

Post sia enoficiĝo la sekretario serĉis ĉie K-don Ĉen Gingjun. K-dino Ĝoŭ jam sciigis al li ĉion pri kio ŝi informiĝis. Kaj la sekretario intervidiĝis kun Ĉen Gingjun en kvietaj angulo de la biblioteka libroŝtalo.

La Nacia Festo ĵus pasis, brilis la oktobra suno en la serena ĉielo. La sekretario portis nur

ĉemizon, tamen la malforta Ĉen Gingjun jam surmetis vatitan jakon.

“Mi dankas vin, Sekretario Li,” diris Ĉen Gingjun, kiu emas danki ĉiun ajn renkontitan. “Mi tre ĝojas,” li diris serion da “ĝojas”. Li jam sentis intimecon je ekvido de Sekretario Li. “Estas tre ĝojinde, Sekretario Li. Mi tre ĝojas, Sekretario Li, estas tre ĝojinde.”

Sekretario Li demandis al li: “Ĉu estos bone, ke je duono post la kvina post la deĵoro mi vizitu vin en via ĉambro?”

Iom pensinte Ĉen Gingjun respondis: “Jes, jes, mi tiam atendos vin je la pordo de la domo, alie vi ne trovos mian ĉambro.”

“Ne, vi ne bezonos tion fari,” diris Sekretario Li. “Kial mi ne povos trovi vin. Mi certe vin trovos, kaj vi ne bezonos atendi min.”

Tamen Ĉen obstine diris: “Mi atendos vin ĉe la pordo de mia domo, alie vi ne povos trovi la ĉambro kaj tio ne estos oportuna.”

Kaj efektive li atendis lin posttagmeze ĉe la pordo. Li bonvenigis Sekretarion Li kaj akompanis lin al iu malgranda ĉambro sur la tria etaĝo. La ĉambreto havas nur areon de 6 kvadrataj metroj. Sub ĝi estas kaldronejo, kies granda ortangula fumtubo trapasas lian ĉambro, fortranĉinte sesonon de la ĉambro tiel ke ĝi fariĝis tranĉil-forma. Evidente ĝia mastro ĵus balais ĝin. La fenestro estis plene kovrita per ĵurnalpapero. Kvankam la sunlumo de aŭtuno estis tre bela tamen en la ĉambreto estis malhele. Sekretario Li tute ne atendis, ke tiel malbone li loĝas. Sidiĝinte sur la lito, li diris: “Tre pura estas via lito!”

“Ja nova litkovrilo, ĵus aĉetita,” diris Ĉen Gingjun. “Ĉar vi volas viziti min, mi speciale ĝin aĉetis,” li montris la brile blankan litkovrilon kun desegnaĵo de bluaj kvadratoj. “Dankon al vi, Sekretario Li, mi tre ĝojas, ĉar jam de tre tre longa tempo, neniu vizitis . . . vizitis min.” Tremetis lia voĉo kun larma tono. Je tiu palpebrumo, Sekretario Li sentis skuadon de lia voĉo, kaj indigno ekbrulis en li. Neniam tiel emociiĝis tiu partia laboranto. Kia absurdo! Eĉ

mankas tablo al la ĉambreto, kaj la ĉambreto kun ses kvadrataj metroj estis malplena kvazaŭ dezertejo. Pakoj da notpaperoj elŝovis sian vizaĝon el du jutaj sakoj ĉe la angulo. Sur la radiatoro 4-folia kuŝis manĝoskatolo, amaso da medikamentaj boteloj kaj du termosoj. Eĉ neniu seĝeto troviĝis. Kial estis unu lampo kerosena? Tial ja, ne ekzistis elektra lampo en la ĉambro. “Kial?” li demandis, “kial ne estas elektra lampo?”

“Mi ne bezonas ĝin,” respondis li, “ne bone estas kun lampo. Lampo ĝenas. Ĉar en tiu ĉi domo multaj uzas elektrajn fornojn. Tro peze ŝarĝataj estas la elektraj fadenoj kaj oni ofte ekzamenas la linion de ĉambro al ĉambro. Sed ili neniam venas al mi, ĉar mi ne havas elektran lampon nek elektran fadenon. Tial lampo ne estas bona, ĉar ĝi ĝenas.” Li finis sian parolon kun ĉagrena rideto.

“Kaj tablo? Kial vi ne havas tablon?”

Ĉen Gingjun tuj levis la novan litkovrilon kune kun la matraco, kaj ekaperis la littabulo. Montrante ĝin li diris: “Jen, ĉu ne? Sur ĝi mi ankaŭ povas labori.”

Sekretario Li kuntiris siajn brovojn kaj kunpremis siajn dentojn. Li pensis en si: “Ha, estas eĉ tia afero en Ĝonguancun, en la Akademio de Sciencoj. Vere estas tretado al homoj, tretado al sciencoj!”

Sekretario Li revenis al sia oficejo kaj vizitis la estron de la administra fako Olda Ĝang, kiu venis tien je unu semajno pli frue ol li. Informiĝinte pri tio, la lasta opiniis tion ne vera: “Mensogo, kiel povas ne esti lampo?” Sekretario Li rakontis al li la izolitecon de la ĉambreto. Tiom malordigis la Akademion de Sciencoj la homoj “kun pikiloj sur la korpo kaj kornoj sur la kapo”! Li tuj venigis elektriston, kaj la lasta tuj iris instali lampon al la ĉambro. Instaliĝis lampo kaj ŝaltilo. Je ektiro, eklumis la lampo. Kaj tiam Ĉen Gingjun jam sin klinis al tablo kaj ekskribis.

La lumo revenis al la koro de Ĉen Gingjun.

(Daŭrigota)



Bejhaj-parko

de ĜANG ZUGANG

OKCIDENTE de la Imperiestra Palaco sin trovas vasta etendado de akvo konata kiel Tajjelageto aŭ la Tri Maroj, t.e. Nanhaj (la Suda Maro), Gonghaj (la Meza Maro) kaj Bejhaj (la Norda Maro). En Bejhaj staras bela insulo Kjonghua. Tiu pitoreska loko kun ĉarma pejzaĝo estas fame konata Bejhaj-parko.

Bejhaj-parko, la plej antikva imperiestra ĝardeno, estiĝis jam antaŭ la konstruiĝo de la urbo Pekino. En la deka jarcento, la natura beleco de tiu loko plaĉis al la regantoj de Liaŭ-dinastio kaj konstruiĝis tie ekskursiva palaco. En la 19-a jaro de la regperiodo Dading de Gindinastio (1179 p.K.), oni dragis Bejhaj, elstarigis Kjonghua-insulon per altigo de ĝia monteto, alportis interesajn ŝtonojn el imperiestra parko en Bianliang (nun Kajfeng de Henan-provinco), la ĉefurbo de la Norda Song-dinastio, formis per tiuj sur la insulo interesajn krestojn kaj kavernojn, kaj samtempe plantis tie belajn florojn kaj arbojn kaj konstruis palacajn domojn, dank' al kio formiĝis la bazo de la karakteriza beleco de Bejhaj. Kiam la Unua Imperiestro de Juan-dinastio Kublaj-Hano venis al Pekino en 1264, li loĝis sur Kjonghua-insulo, kaj decidis konstrui ĉefurbon de Juan-dinastio kun tiu insulo kiel la

centro. Kaj poste, King-dinastio aldonis, dum 30 jaroj, multajn belajn konstruaĵojn en tiu loko kaj per tio ankoraŭ pli perfektigis tiun parkon.

Post la fino al la lasta feŭda dinastio, tiu imperiestra ĝardeno malpermesita al plebanoj estis oficiale malfermita al la publiko en 1925. Sed pro putreco de la kuomintanga reakcia registaro, la parko kadukiĝis iom post iom. Nur post la Liberiĝo, ĝi fariĝis loko por kultura aktivado kaj ripozo de la po-

polamasoj. La popola registaro spezis specialan sumon da mono por dragi la lagon kaj ripari la konstruaĵojn, aldonis al la parko arbojn kaj boatojn, plantis lotusojn kaj bredis fiŝojn en la lago kaj faris la pejzaĝon de la parko ankoraŭ pli ĉarma kaj Kjonghua-insulon pli riĉa je ombraj verdaĵoj.

Ĉiuj kiuj vizitas Bejhaj-parkon certe ne preteratentas ĝiajn du arkopontojn kaj unu rondan miniaturan urbon. La ŝtona arkoponto

Bejhaj-parko



kun 9 spanoj, kiu dislimas la Nordan Maron kaj la Mezan Maron, estas nomata Juhe-ponto. La origina ponto larĝis je 9 metroj kaj post rekonstruo en 1959 ĝi larĝas 28 metrojn. Ĉe ĝia orienta fino, en la okcidenta flanko de la suda pordo de Bejhaj-parko, sin trovas ronda teraso kun ĉirkaŭmuro 5 metrojn alta. Tio estas la Ronda Urbo. Sur tiu teraso troviĝas eleganta korto kun halo, kioskoj, koridoroj kaj antikvaj arboj. En la kvadrata halo en la norda flanko troviĝas budha statuo el blanka jado. Ĝi altas 1.5 metrojn. Tiu statuo estas tre delikate skulptita kaj inkrustita per gemoj sur la tuta korpo. Sed bedaŭrinde, ke ĝia maldekstra brako estis difektita de glavo en 1900, kiam la agresiva armeo de la ok imperiismaj landoj

invadis Ĉinion. En la ŝtona kiosko antaŭ la halo troviĝas kuvo el nigra jado kun diametro de 1.5 metroj kaj alteco de 66 centimetroj. Ĝia eksteraĵo estas ornamita per gravuritaj fiŝoj, drakoj kaj maraj bestoj vigle naĝantaj en ondoj. Ĝi estas objekto antaŭ pli ol 700 jaroj, uzita de Kublaj-Hano kiel vinujo dum festeno por regali siajn korteganojn. Enirinte la sudan pordon de Bejhaj-parko post descendo de la teraso de la Ronda Urbo, oni povas vidi, se oni sin turnas maldekstren, la duan arkoponton iom kurban Jong-an, ĉe kies ambaŭ finoj staras po unu *paifang-o* (pordforma trapasejo simila al triumfarko).

Trans la ponto ja estas Kjonghua-insulo kun Jong-an templo en la


fronto. De tiu templo ĝis la blanka pagodo sur la montpinto estas klara akklinio, sur kiu troviĝas aro da religiaj konstruaĵoj formantaj la konstruan centron sur la fronta flanko de la monto. En King-dinastio, je la 25-a de ĉiu deka monato laŭ la ĉina kalendaro, lamaoj preĝadis en akompano de muziko ĝis profunda nokto por difavoro al la imperiestro, dum la monteto estis iluminata de supre ĝis malsupre. Supre de la monteto, ĉe la loko, kie nun staras la blanka pagodo, troviĝis halo ĉ. 20 metrojn alta en Gin-dinastio. Ĉar tiu loko estis alta kaj ombra, la halo estis malvarmeta en somero kaj pro tio ĝi ricevis la nomon Malvarma Halo. Tiu halo staris en la centro de la insulo kaj tie la imperiestro aranĝis

Bejhaj-parko





La Kvin Drakaj Kioskoj



La Naŭdraka Muro


ŝtatajn aferojn aŭ regalís siajn korteganojn. Je la fino de Ming-dinastio, tiu halo disfalis. En la 8-a jaro de la regperiodo de la imperiestro Sunĝi de King-dinastio (1651 p.K.), oni konstruis sur tiu loko blankan pagodon kun tibeta stilo. Tiu pagodo altas je 35.9 metroj kaj la montsupro, sur kiu staras la pagodo, altas je 32.8 metroj. En la ĉirkaŭaĵo de la parko, oni povas

vidi tiun konstruaĵon de hela koloro kaj harmonia plastika formo. Starante ĉe la piedo de tiu pagodo oni povas vidi panoramon de la urbo kun la domoj de la Imperiestra Palaco kaj novaj konstruaĵoj. Pro tio, ke oni povis vidi malproksime en tiu loko, regantoj de King-dinastio starigis tie flagstangon kaj signalan kanonon, kaj kiam okazis popola insurekcio, oni hisis flagon en la

tago kaj pendigis lanternon en la nokto kaj samtempe alarmís per kanono por sciigi garnizonajn trupojn en diversaj lokoj por subpremi la leviĝantajn popolanojn.

Se oni descendas de la monteto okcidente kaj sin turnas al la sudo, oni povas veni, ĉe la monttalo, al Juehin-halo kaj la etaĝdomo Kinghiaŭ, kiuj prezentas oportunajn lokojn por rigardi pejzaĝon. Antaŭe, imperiestroj de King-dinastio ofte venis al tiuj lokoj en vintro por rigardi surglacian pilkoludon.

Se oni iras malsupren en la okcidenta flanko de tiu loko, kaj sin direktas al la nordo, oni povas atingi la domon Jueguloŭ, sur kies internaj muroj troviĝas 495 ŝtonpecoj kun gravuritaj skribaĵoj de famaj ĉinaj kaligrafoj en la pasintaj pli ol 1,500 jaroj. Post eliro de tiu konstruaĵo, iru norden laŭ la bordo, vi povas eniri duetaĝan koridoron kun longeco de 300 metroj en arka formo. La lagbordo en ĝia norda flanko estas borderita per blankmarmora balustrado. En la meza parto de la koridoro elstarigas du malgrandaj domoj kun levitaj tegmentrandoj kaj pentritaj traboj, kiuj aspektas tre elegantaj.



La Ronda Urbo

Apud la transa bordo nordokcidenta de la lago staras la Kvin Drakaj Kioskoj interligiĝantaj, atingeblaj per boatoj. La kioskoj elstaras en la lago kaj tiu loko estas ideala por ĝui la belajn de Kjonghua-insulo de malproksime.

Nordoriente de la Kvin Drakaj Kioskoj estas la fama Naŭdraka Muro. Ĝi estis konstruita en 1756 p.K. Tiu masonaĵo el koloraj kaheloj longas 27 metrojn, altas 5 metrojn kaj dikas 1.2 metrojn. Ambaŭflanke de ĝi troviĝas po 9 diverskoloraj drakoj, kiuj interbatalas en nuboj super maro. La


figuroj estas tre vivecaj kaj la koloroj tre brilaj. Sude de tiu muro estas artisme skulptita fera ekranmuro staranta antaŭ Ĉengguan-halo. Tiu historia restaĵo estas el Juandinastio.

Nordoriente de la Fera Ekranmuro estas malgranda ĝardeno nomata Ginghinĝaj en sudĉinia stilo. En tiu ĝardeno troviĝas artefarita monteto el ŝtonoj alportitaj de Tajhu-lago, etaĝdomo en verdaj ombroj kaj lageto, kiuj formas tre karakterizan vidindaĵon frappe kontrastantan kun la vasta natureca pejzaĝo de la parko. Tiu aranĝo

donas efekton similan al tiu de Hiekjujuan en la Somera Palaco, nome apartan ĉarmon de parko en parko. Oriente de tiu ĝardeno estas la posta pordo de la parko.

Se oni ne iras el la posta pordo kaj promenas preter ĝi plu antaŭen laŭ la orienta bordo de la lago, oni venas, post transpaso de ponteto, inter teran monteton kaj arbarojn, kie lokiĝas aroj da kvietaj konstruaĵoj. Dank' al tiu aranĝo, pli elstariĝas la ĉefa belajo de Kjonghua-insulo kaj pliriĉiĝas la gustoj de la parko. Ĉio tio montras la altan nivelon atingitan de la antikva ĝardenarkitekto de Ĉinio.





Geamikoj, vizitu nin refoje

— Notoj pri Ĉina Ensemblo en Usono

de HIA GAŬLONG

EN kulmina somero, la Ĉina Ensemblo el 150 membroj transpasis la Pacifikon por fari turneon de 40 tagoj en Usono. Prezidanto J. Carter akceptis la ensemblon en la Roza Ĝardeno de la Blanka Domo je la 20-a de julio. La varia riĉenhava repertuaro de la ensemblo, kiun la usonaj ĵurnaloj nomis "artambasadoro", gajnis varman aplaŭdon ĉe usonaj spektatoroj. La gastludado pliprofundigis la komprenon de la usona popolo pri Ĉinio kaj plifortigis la amikecon inter la du popoloj. Iu usona maljunulo diris kun emocio post spektado de la prezentado: "Inter Ĉinio kaj Usono estas longa distanco, tamen la du popoloj restas intime kune!"

Programeroj verkitaj por la popolo

En la repertuaro prezentita de la Ĉina Ensemblo estis fragmentoj el klasikaj teatraĵoj de la Pekina Opero kaj el modernaj baledoj, ludoj de ĉinaj folkloraj muzikiloj, solludo de piano, ĉinaj popolaj dancoj kaj kantoj kaj ankaŭ usonaj kantoj kaj aliaj okcidentaj muzikajoj, kiujn konas kaj ŝatas la usona popolo. "Vaŝingtona Poŝto" figure priskribis la prezentadon kiel "grandegan ole-pentraĵon de la ĉina prezenta arto".

Plejparto de la prezentitaj programeroj estas sendube fremdaj por la usonaj spektatoroj,



La Ĉina Ensemblo estis varme bonvenigata de usonaj amikoj kaj ĉinaj elmi-grintoj.

tamen bone diris la fama usona danc-majstrino Martha Graham: "La programeroj estas kreitaj por la popolo, tial la popolo povas ilin kompreni." Kiel en la usona ĉefurbo Vaŝingtono aŭ en la plej granda urbo Nov-Jorko, tiel en Minneapolis ĉe la mez-okcidento aŭ en San-Francisko kaj Los-Anĝeleso ĉe la okcidenta marbordo, la varmkoraj kaj serenaj usonaj spektatoroj montris grandegan interesiĝon kaj varman akceptemon al la prezentadoj fare de la ĉinaj artistoj.

Ponto de amikeco

La Ensemblo faris sume 29 prezentadojn en Usono, la spektatoroj ĉiam estis entuziasmaj kaj la aŭditorio ĉiufoje estis plenplena. Tio manifestis unuflanke, ke la alta nivelo de la prezentado estis tre aprecata de usonaj spektatoroj, aliflanke, ĝuste kiel montris fondintino de la Centro Wolf Trap en Vaŝingtono, ke "Tio montris, ke la usona popolo havas tre grandan intereson por pli multe koni la ĉinan popolon kaj pli multe proksimiĝi al ĝi". Antaŭ la unua prezentado en Vaŝingtono estis jam tute elvenditaj ĉiuj enirbiletoj por 5 prezentadoj entute. La teatro povas enteni 6 mil spektatorojn. Ĝia laboranto diris: "La prezentado de la Ĉina Ensemblo altiris la plej grandan nombron da spektatoroj al nia teatro. Kvankam tute elĉerpiĝis la biletoj,

tamen homoj ankoraŭ ĉiam alvenis senĉese." Tiuj, kiuj ne akiris bileton, sentis grandan bedaŭron.

Pri la prezentado de la ĉinaj artistoj, la spektatoroj per malsamaj vortoj esprimis la saman senton. Iu nov-jorka spektatoro diris: "Kvankam tiuj programeroj estas fremdaj kaj neimageblaj por ni, tamen ni povas kapti ilian sencon . . . Tio estas konsistiga parto de la longa ponto konstruita por plibonigi la rilatojn inter niaj du popoloj." En Minneapolis iu inĝeniero diris: "Usono kaj Ĉinio dispartigis unu de la alia tro longe. Ni malmulte konas Ĉinion kaj la estintaj konoj estas ofte unuflankecaj. Nun jam estas tempo por fini tiun staton." En Los-Anĝeleso iu maljunulo, kiu de multaj jaroj ĉiam amike zorgis pri la disvolviĝo de la nova Ĉinio kaj du fojojn spektis la prezentadon kune kun siaj idoj, diris "Estas tro longe dispartigitaj la popoloj de Ĉinio kaj Usono. La prezentado helpis nin pli multe kaj pli bone koni Ĉinion. Tio estas bona por ni ambaŭflanke. Necesas daŭre plivastigi tiajn aktivadojn."

Por esprimi sian amikan senton al la usona popolo, Guo Ŝuĝen kaj Hu Songhua plurfoje kantis la usonajn kantojn "Ameriko la Bela", "Hejmo sur la Brutbieno" kaj aliajn, kio vekis

Aĉetantoj de enirbiletoj por prezentado de la Ĉina Ensemblo en Novjorko





Prezidanto J. Carter akceptis la Ĉinan Ensemblon en la Roza Ĝardeno de la Blanka Domo.

fortan eĥon ĉe la spektatoroj. Kiam la orkestro ekludis, per ĉinaj folkloraj muzikiloj, la usonan popol-muzikajon "Meleagro en la Fojno", iuj spektatoroj eĉ forlasis sian sidlokon kaj ekdancis sur libera planko laŭ la takto de la melodio laŭte kriante: "Ĉinio!" "Usono!" "Bone!" Vidante tiun kortuŝan scenon, maljunulo Montgomery ĝoje diris: "Dank' al tia arta interŝanĝo, la popoloj de Ĉinio kaj Usono povas ankoraŭ pli proksimiĝi unu al la alia."

Vizitu nin refoje

La amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Usono havas longan historion. Ĉifoje la ĉinaj artaj laborantoj venis al Usono kunportante amikecon de la ĉina popolo al la usona popolo. Dum ilia restado en Usono, ili ĉiam kaj ĉie sentis profundan amikecon de la usona popolo al la ĉina popolo. Akceptante la ĉinajn gastojn, Prezidanto J. Carter montris, ke la turneo de la Ĉina Ensemblo "faros kontribuon por la amikeco inter niaj du popoloj". Ĝuste tiel okazis. La prezentado vere pluapaŝe akcelis la interkomprenon kaj amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj Usono.

Usona pianistino Sinjorino F. R. Hadden estas malnova amikino de la ĉina popolo. Ŝi naskiĝis

en Ĉinio. Dum la Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio, ŝi simpatiis la justan aferon de la ĉina popolo, faris multajn prezentadojn kune kun Ĝoŭ Hiaŭjan, vicedestrino de la ensemblo, kaj plurfoje vidis Kamaradon Ĝoŭ Enlaj kaj ankaŭ Kamaradon Ĝu De. Ĉifoje ŝi speciale venis al Minneapolis kun Sinjoro Hadden, intervidiĝis kun sia malnova amikino Ĝoŭ Hiaŭjan, kiun ŝi jam ne vidis dum 40 jaroj, kaj spektis prezentadon de la ensemblo. Kun ekscitiĝo ŝi diris rememorante la pasintaĵojn, ke en 1972, kiam ŝi refoje vizitis Ĉinion, Ĉefministro Ĝoŭ esprimis, ke li sendos kulturen grupon viziti Usonon. La vizito de la ensemblo realigis lian deziron, pro kio ŝi estas tre tre ĝoja. En la tago de adiaŭo, gesinjoroj Hadden venis al la loĝejo de la ensemblo por adiaŭi Ĝoŭ Hiaŭjan kaj ilian kolegon Liu Ŝikun. Sinjorino Hadden speciale montris al siaj ĉinaj geamikoj fotojn de Kamarado Ĝoŭ Enlaj kaj Ĝu De, kiujn ŝi faris kaj zorge konservis pli ol 40 jarojn, kaj skribaĵojn propramane faritan de Kamarado Ĝoŭ Enlaj por ŝi. Fine ili petis Liu Ŝikun transdoni du delikatajn naztukojn al Kamaradinoj Deng Jingĉaŭ kaj Kang Keking. Ili deziris sanon al la lastaj kaj senĉesan disvolviĝon al la amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Usono.



Ekskurso sur la insulo Rhode

M. Graham, ĉirkaŭ 80-jara usona majstrino de moderna danco, estas unu el la geamikoj nove konitaj de la ĉinaj artistoj en Usono. Ŝi alte taksis la prezentadon de la Ĉina Ensemblo. Ŝi diris, ke ŝi neniam vizitis Ĉinion, tamen dank' al la spektado de la prezentado, nun ŝi jam vidis la veran teron, veran ĉielon kaj veran kulturon de Ĉinio. Ŝi komplezeme invitis ĉinajn dancistojn gastigi ĉe ŝia baleta trupo kaj rigardi la bazajn movojn baletajn faritajn de usonaj dancistoj. Krome, ŝi ankaŭ donacis al siaj ĉinaj amikoj la libron "Notoj pri Danc-verkado", la frukton de ŝia multjara diligenta laborado. Tiu maljunulino, kiu okupiĝis pri danc-arto dum la tuta vivo, ripetfoje esprimis, ke refoja vizito de la ĉinaj dancistoj al ŝia lando estos bonvena por interŝanĝi ludarton kaj lerni unu de alia.

Same neforgesebla estas tio, ke ordinaraj usonaj popolanoj diversmaniere esprimis sian amikan senton al la ĉinaj artistoj kaj la ĉina popolo. Iu blankhara maljunulino longe ne volis foriri post prezentado. Ŝi petis ĉinajn amikojn "diri al la ĉina popolo, ke la usona popolo tre amas kaj respektas la ĉinan popolon kaj esperas, ke ili sukcese konstruos sian landon en potenca landon". La hotelo Maja Floro en Nov-Jorko

estis la unua hotelo, kie ripozis la Ĉina Ensemblo. Por ke la manĝaĵoj plaĉu al la ĉinaj gastoj, la kuiristoj de tiu hotelo lernis kuirigi ĉin-stile rizajn, vermiĉelojn, pasteĉojn, rostitan vianĉon . . . Kiam ili eksciis, ke iuj aktoroj ne ŝatas grasajn, ili aĉetis de magazenoj administrataj de elmigrantaj ĉinoj bongustan legomon preparitan laŭ ĉina maniero. La ĉefkuiristo estis okupata de frumateno ĝis profunda nokto. Kiam ĉinaj gastoj esprimis al li sian dankon, li sciigis al ili, ke la kelkdek kuiristoj de la hotelo senescepte estas amikaj al la ĉina popolo kaj plezure servas al la ĉinaj amikoj. Ĉe adiaŭo, la kuiristoj kaj aliaj servistoj de la hotelo donis al ĉiu membro de la ensemblo donacaĵon kun la surskribajo: "Vizitu nin refoje! Sukceson al la prezentado de la Ĉina Ensemblo!"

Sukcese finiĝis la turneo de la Ĉina Ensemblo en Usono. Kiam la ĉinaj artistoj, plensarĝite per la amikeco de la usona popolo al la ĉina popolo, adiaŭis Usonon, sur la aerodromo aŭdiĝis: "Ĝis revido!" "Vizitu nin refoje!" La mastroj kaj gastoj diris unu al alia, ke la amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Usono estu senlime vasta kiel la blua Pacifiko, kaj torenta senhalte kiel Misisipo kaj Jangzi-rivero!

Kulturaj Kontaktoj

Kanada Fotografia Ekspozicio

Je la 8-a de aŭgusto la nomita ekspozicio inaŭguriĝis en la Kultura Palaco de Laboruloj de Pekino.

En ĝi estis eksponataj pli ol 50 verkaĵoj de pli ol 20 kanadaj fotografistoj. Tiuj fotoj kun diversaj temoj kaj malsamaj stiloj, fotitaj per variaj lumo kaj koloroj, montris eminentan fotografion de kanadaj artistoj, ilian admiron kaj prikantadon al la bela natura pejzaĝo de sia patrolando kaj donis al la rigardantoj ĝuon de belo.

La eksponaĵoj donis al la vizitantoj ŝancon apreci ĉarman pejzaĝon de la acera lando kaj ebligis al niaj fotografistoj kaj fotaj amatoroj

ricevi inspiron el ili kaj lerni utilan sperton de kanadaj fotografistoj.

Valoraj Donacoj

Antaŭtagmeze de la 12-a de aŭgusto, du viglaj kaj amindaj tigridoj kaj unu elefantido de Kamboĝo, sub flegado de bredistoj, veturis per aviadilo Boein G 707 de la aerodromo Po Chentong de Pnompeno al Pekino.

Ili estas donacoj senditaj de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Kamboĝo al la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio.

En februaro de la kuranta jaro, kooperativanoj de Kamboĝo kaptis la du tigridojn kun la aĝo de unu monato en sudokcidenta montaro. Post duonjara bredado la du tigridoj kreskis respektive de du kilogramoj ĝis pli ol 20 kilogramoj.

La elefantido kun nomo "Progreso" aĝas nur kvar jarojn, sed jam pezas 700 kilogramojn.




Ĉinaj kaj rumanaj geknaboj kune sin amuzas.

Infana Prezenta Trupo en Rumanio

En julio ĉijare, la Nanking-a Infana Prezenta Trupo de Ĉinio vizitis Rumanion.

Je la vespero de la 20-a de julio, la trupo faris la unuan prezenton en la infana teatro de Bukareŝto, pli ol 500 spektatoroj, inter kiuj plejparto estis infanoj, rigardis ilian prezentadon.

La infanoj prezentis dancojn, popolajn muzikaĵojn, ĥorojn kaj solojn. La danco "Malgrandaj Anasoj" ludita de Li Biaŭ kaj aliaj kvar ok-jaraj infanoj ricevis varman laŭdon kaj estigis naivan ridon ĉe la malgrandaj spektatoroj. Post kiam la kantistetoj Gin Mej kaj Tang Ĵugiang respektive kantis kantojn "Mia Moldavio" kaj "Aminda Printempo" en la rumana lingvo krom plurajn ĉinajn kantojn, iuj spektatoroj nereteneble stariĝis kaj kriis "Tre bone!" "Bonege!" Ankaŭ la soloj de ĉinaj muzikiloj *Erhu*-o, bivo kaj fluto de Ĝang Giahong, Caŭ Huj k.a. ricevis varman aprobon. Kiam Lin Min lerte ludis la rumanan muzikaĵon "Alaŭdo" per ksilofono, la spektatoroj eĉ manklakadis laŭ la gajaj taktoj.



La du tigretoj



La Revolucio de 1911

de ĤI ĜIN

EN la komenca periodo de la 20-a jarcento, pro la kruela ekspluatado kaj subpremado de imperiistoj kaj feŭdaj fortoj, centoj da milionoj da ĉinaj popoloj ne povis vivi plu kiel kutime kaj leviĝis al ribelo. La ligo Tong Meng Huj gvidata de Sun Jatsen ofte faris arman leviĝon. Kaj la spontanea batalado de la amasoj en urboj kaj kamparo kontraŭ impostoj, insurekcio de malsatuloj, batalado kontraŭ tiranado de fremdlandaj eklezioj kaj por repreno de perditaj rajtoj okazis unu post alia tra la tuta lando.

Fronte al la alta revolucia tajdo, la registaro de King-dinastio unuflanke faris sangan subpremadon kaj politikan trompadon, aliflanke intensigis sian klopodon por kapitulaci al imperiistoj per forvendo de la suvereneco ktp. En majo de 1911, la registaro de King-dinastio eĉ proklamis pri ŝtatigo de la fervojoj de privatuloj, kaj vendis la rajton de la fervojoj al imperiismaj landoj. Tiu naciperfida fiago tuj kaŭzis fortan oponadon de la popoloj de ĉiuj socita-




Sun Jatsen (la 5-a de maldekstre en la unua vico) je sia prezidantiĝo en Nankino je la 1-a de januaro, 1912

voloj kaj leviĝis la grandega tajdo fervojdefenda. La popoloj de la provincoj Hubej, Hunan kaj Guangdong okazigis kunvenojn, prezentis peticiojn kaj manifestaciis esprimante fortan proteston. La popoloj de Ĉengdu, la ĉefurbo de Siĉuan-provinco kaj ĝiaj gubernioj fondis la Ligon de Kamaradoj por Fervojdefendo kaj faris strikan bataladon en komerco, lernejoj kaj pago de impostoj. Ĝaŭ Erfeng, la

estro de la nomita provinco, faris sangan subpremadon, kio ankoraŭ pliindignigis la popolojn. La membroj de Tong Meng Huj gvidis la popolojn de iuj gubernioj por leviĝo. Ili atakis la urbon Ĉengdu kaj poste batalis en multaj aliaj lokoj. La movado de fervojdefendo de la popoloj de Siĉuan skuis la regadon de King-dinastio en Siĉuan kaj akcelis la disvolviĝon de la revolucia situacio de la tuta lando kaj fariĝis la meĉo de la Vuĉang-a Leviĝo.

Vuĉang estis la ĉefurbo de Hubej, ĝi konsistigas la urbotrion kune kun Hankoŭ kaj Hanjang transborde de Jangzi-rivero. En tre frua tempo, revoluciuloj en tiu loko jam fondis revoluciajn organizojn kaj faris longtempajn propagandajn kaj organizajn laborojn en la nova armeo garnizonanta en Hubej--

En la Revolucio de 1911, la ribela trupo de Hankoŭ preta por ekmarŝo




provinco. La nova armeo estis moderna trupo de la King-dinastia registaro fondita laŭ modelo de kapitalismaj landoj. Plejparto de ĝiaj armeanoj estis bankrotaj kamparanoj kaj malriĉaj urbaj junuloj. Dank' al sekreta edukado de revoluciuloj, multaj el ili partoprenis en revolucia organizo aŭ inklinis al la revolucio. En aŭtuno de 1911, revoluciuloj planis fari leviĝon, sed la sekreto estis malkaŝita. En la komenco de oktobro, la registaro de King-dinastio amase kaptis kaj murdis revoluciulojn kaj Vuhan dronis en teroro.

En la nokto de la 10-a de oktobro, la revoluciaj soldatoj de la Nova Armeo de Hubej-provinco, sub gvido de revoluciaj partianoj, mortigis la reakciajn oficirojn kaj kuris el la garnizonejo rekte al la buroo de armiloj, kune kun la tieaj revoluciaj soldatoj prenis pafilojn kaj municion kaj atakis la oficejon de la provincestro de Hubej. La provincestro panike forkuris trans la posta muro kaj la leviĝintaj soldatoj rapide okupis la nomitan oficejon kaj poste ankaŭ la urbojn Vuĉang, Hanĵang kaj Hankoŭ. En la 11-a, la revoluciaj partianoj fondis la Hubej-an Militan Registaron kaj proklamis abolon de la imperiestro Hjuantong de King-dinastio.

La venko de la Vuĉang-a Leviĝo kuraĝigis la popolon de la tuta lando. Tra la tuta Ĉinio ĉie brulis la revolucia fajro kontraŭ King-dinastio, la lakeo de imperiistoj; kaj formiĝis la tria revolucia alta tajdo de la moderna revolucio de Ĉinio post la revoluciaj movadoj de la Tajping-a Ĉiela Regno kaj Jihetuan.

Post la Vuĉang-a Leviĝo, ĉiuj provincoj proklamis sendependiĝon kaj tiam la revolucio bezonis unu tutlandan gvidan institucion. En



Dekreto pri la detroniĝo de la imperiestro de King-dinastio publikigita je la 12-a de februaro, 1912

decembro de 1911, D-ro Sun Jatsen revenis al Ĉinio. En la fino de tiu monato, la reprezentantoj de ĉiuj provincaj registaroj kunvenis en Nankino, decidis starigi provizoran registaron en Nankino kaj elektis Sun Jatsen kiel provizoran prezidanton.

En la Novjara Tago de 1912, la granda pioniro de demokratia revolucio Sun Jatsen ĵuris en Nankino por enoficiĝo kaj proklamis la fondiĝon de la Ĉina Respubliko kaj la jaro 1912 fariĝis la unua jaro de la nomata respubliko. La provizora registaro konsistis el la revoluciaj partianoj, konstituciistoj kaj malnovaj burokratoj kaj militaristoj. Sed en la registaro la burĝaj revoluciistoj reprezentataj de Sun Jatsen kaj Huang Hing okupis la gvidan lokon. Tial, ĝi estis revolucia potenco kun naturo de burĝa respubliko. Ĝia fondiĝo markis la pereon de la feŭda aŭtokratio, kiu regis Ĉinion dum pli ol 2,000 jaroj.

La rapida disvolviĝo de revolucio en la tuta lando teruris la imperiistojn kaj la enlandajn reakciajn fortojn, kaj vekis ilian malamegon. Frue dum la Vuĉang-a Leviĝo, Britio, Usono, Rusio, Japanio, Germanio kaj Francio jam minacis, per siaj maraj kaj teraj armeoj, la leviĝantan armeon kaj subtenis King-dinastion en financo kun la intenco estingi la revolucio. Poste, ili trovis, ke pereado de King-dinastio

jam estis neevitebla, ili sin ŝajnis "neŭtralaj" kaj tutforte subtenis sekrete la novan lakeon Juan Ŝikaj.

Juan Ŝikaj, militaristo kun la Bejĵang-a armeo sub sia komando, ĉiam tiranis super la popolo kaj flatis imperiistojn. Antaŭ la Revolucio de 1911, li ne okupis gravan lokon en la kortego pro kontraŭdiro inter li kaj King-dinastiaj potenculoj. Post la Vuĉang-a Leviĝo, imperiistoj rapide elektis por si tiun fidindan potenculon kaj dank' al ilia subteno, Juan Ŝikaj estis nomumita kiel ĉefministro de la King-dinastia registaro, kaptis la komandon de la mara kaj la tera armeoj kaj fariĝis tenanto de la politika potenco. Post sia enpotenciĝo, li aplikis reakcian duoblan politikon de atako en unu flanko kaj trompa altiro en alia flanko. Post la venko de la Vuĉang-a Leviĝo, li unuflanke okupis per sia armeo Hankoŭ kaj Hanĵang kaj bombardis Vuĉang, aliflanke proponis armisticon interkontraktadon, intencante allogi la revoluciajn partianojn fari kompromison. La revoluciuloj submetiĝis al la premado kaj akceptis la proponon. En la mezo de decembro de 1911, komenciĝis la "intertraktado inter la Sudo kaj la Nordo" en Ŝanhajo. En la komenco de la intertraktado, la imperiismaj landoj aplikis politikan kaj militan premon al la revolucia flanko, dum la enlandaj reakciaj fortoj energie fabri-

kis publikan opinion ke "nur Juan Sikaj taŭgas". Kaj la konstituciistoj kaj ankaŭ la malnovaj burokratoj kaj militaristoj miksitaj en la revolucia tendaro subfosis la revolucion je tiu ŝanco. Ankaŭ multaj el la revoluciuloj proponis kompromisi kun Juan Sikaj por gajni unuiĝon inter la Nordo kaj la Sudo de la tuta lando. Poste, la revoluciuloj cedis paŝon post paŝo en la intertraktado kaj konsentis, ke la potenco povas esti cedita al Juan Sikaj nur se efektiviĝos respublika reĝimo. En la komenco Sun Jatsen ne konsentis fari armistitan intertraktadon, tamen, sub premo de eksterlandaj fortoj li ne povis ne deklari, ke Juan povas esti elektita kiel provizora prezidanto, nur se la imperiestro de King-dinastio abdikos, kaj Juan Sikaj aprobas la respublikan sistemon.

Kiam Juan Sikaj akiris garantion pri cedo de potenco de la revoluciuloj, li devigis la imperiestron de King-dinastio detroniĝi per la revolucia forto. La tiama imperiestro estis nur 6-jara knabo kaj lia potenco estis en la manoj de siaj patro kaj aristokratoj. Kvankam ili ne volis transdoni la potencon, tamen en la senesperiga situacio ili devis konsenti. En la 12-a de feb. de 1912, Puji, la lasta imperiestro de Ĉinio, deklaris detroniĝon, sub la kondiĉoj "ne aboli la titolon", "provizore vivi en la palaco" kaj "ricevi 4.000.000 uncojn da arĝento ĉiujare". En la sekvanta tago, Juan Sikaj telegramis al la Nankina Provizora Registaro kaj deklaris, ke li konsentis la respublikan sistemon kaj promesis "neniam permesi restarigon de la imperiestra sistemo en Ĉinio". En la 15-a de feb. la Provizora Konsilantaro de Nankino elektis Juan kiel provizoran prezidanton.

Kvankam la revoluciuloj Sun Jatsen k. a. kompromisis kun Juan

Sikaj, tamen ili esperis efektivigi la burĝan respublikon en Ĉinio. Pro tio, kiam Sun abdikis, li elmetis la postulon, ke la nova prezidanto devas praktiki la "Provizoran Konstitucion", kaj konsenti, ke Nankino estu la ĉefurbo, por preventi diktaturon kaj restaŭron de aŭtokratio fare de Juan Sikaj. En la 11-a de mar. de 1912, Sun Jatsen publikigis la "Provizoran Konstitucion de la Ĉina Respubliko". Ĝi estis dokumento kun naturo de konstitucio de burĝa respubliko. Ĝi difinis la grandan atingon de la Revolucio de 1911 pri la renverso de la aŭtokratia sistemo kaj la fondiĝo de respubliko, kaj difinis la demokratiajn rajtojn de la popolo. Samtempe, ĝi ankaŭ decidis la elektan sistemon de la registaro. Tamen, pro ke la revoluciuloj jam fordonis la potencon, do la konstitucio fariĝis nur sensignifa papero.

En la 1-a de apr. Sun Jatsen oficiale forlasis la postenon de provizora prezidanto kaj en la 5-a de la sama monato la Provizora Konsilantaro decidis translokiĝi de Nankino al Pekino. Tiel do la revolucia Nankina Provizora Registaro estis paŝon post paŝo anstataŭita de la kontraŭrevolucia Pekina Provizora Registaro. La Revolucio de 1911 malsukcesis kaj Ĉinio de tiam eniris la reĝperiodon de la nordaj militaristoj.

Kvankam la Revolucio de 1911 malsukcesis, tamen ĝi skribis brilan paĝon en la moderna historio de la batalo de la ĉina popolo kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo. Ĝi renversis la registaron de King-dinastio, enterigis la feŭdan aŭtokratian sistemon de pli ol 2.000 jaroj kaj grave batis la imperiistojn kaj feŭdajn kaj kompradorajn fortojn. Ĝi fondis la respublikon, vaste propagandis la penson de demokratio kaj elhakis vojon por la postaj revoluciaj bataloj de la ĉina popolo.


KALEJDOSKOPO

Ilicia Oleo

En printempo kaj aŭtuno, kiam oni eniras profundajn montarojn vualatajn de densa nebulo en sudokcidenta Guanghi de Ĉinio, ili tuj flaris orkidean aromon alsenditan de vento el ilici-arbaroj.

Ilici-arbo estas ĉiamverda arbo kun alteco de 5-10 metroj. Ĝi havas grizebrunan trunkon kaj glaceajn ovalajn foliojn. Ilici-arboj kreskas en la subtropika Guanghi, kie abundas pluvo kaj la jara mez-nombra temperaturo estas 21-23°C kaj tiu de la plej malvarma monato super 10°C. Tia klimato favoras al la kreskado de iliciaj arboj.

La folioj de ilici-arboj eligas intensan aromon. En printempo kaj aŭtuno oni distilas oleon el iliciaj folioj. Unu tuno da folioj povas produkti 15-17 kilogramojn da oleo.



Oni forsegas ĝian trunkon je la alteco de 1 metro tri jarojn post transplantigo, por ke la arbo kreskigu pli multe da branĉoj kaj folioj.

Ilici-arbo floras kaj fruktas dufoje en printempo kaj aŭtuno, tial oni rikoltas la fruktojn dufoje en ĉiu jaro. Aŭtune la arbo donas pli multe da fruktoj. La formo de la frukto estas kvin-, ses-, sep-, aŭ okangula. Kiam la frukto maturiĝas, ĝia verda ŝelo iom post iom brunigigas, kaj ĝia aromo pli kaj pli in-

tensiĝas. Oni unue plukas la fruktojn kaj poste sekigas ilin sunume. Se oni elpremas oleon el la ŝeloj de freŝaj fruktoj, unu tuno da ŝeloj povas doni 35 kilogramojn da oleo, pli multe ol tiu el la semoj.

La ilicia oleo entenas fenkoleteron, kiu estas grava krudmaterialo en fabrikado de tualetaĵoj, dentopasto kaj medikamentoj. La fruktoj povas esti uzataj kiel drogo kaj spicaĵo. Kiel komercaĵo ĝi ĝuas altan renomon en- kaj ekster-lande.

Lepora Supo

Iutage, amiko de Afanti revenis de ĉasado kaj donacis al li unu leporon. Afanti tre ĝojis kaj regalis la amikon per la leporaĵo. Post malpli ol unu semajno, la ĉasisto denove venis al Afanti, kaj ekfrapis je la pordo.

“Kiu?” demandis Afanti.

“Estas mi, via amiko, kiu donacis al vi leporon.” respondis la ĉasisto.

Afanti regalis tiun amikon per lepora supo.

Post unu semajno kvin-ses homoj interkonsiliĝis: “Ni iru al Afanti

por konatiĝi kun li.” Kaj ili vizitis Afanti.

“Kiu estas vi?” demandis Afanti.

“Ni estas amikoj de via amiko kiu donacis al vi leporon.”

“Ho, bone, bone!”

Afanti regalis ilin per teo.

Post plia semajno, venis al Afanti ok-naŭ homoj. Li demandis, kiuj estas ili.

“Ni estas amikoj de la amikoj de la ĉasisto, kiu donacis al vi leporon.”



“Bonvenon, bonvenon,” diris ĝentile Afanti.

Post kiam Afanti petis ilin enveni la domon, li prezentis al ili po tason da kotakvo.

“Kio estas tio? Ĉu trinkebla?” mire demandis la gastoj.

“Tio ja,” diris Afanti, “estas la supo de la supo de la supo farita el la leporo, kiun al mi donacis mia amiko.”

El “Rakontoj pri Afanti”

Antikva urbo Hi-an

de LU HINGVEJ

HI-AN, la ĉefurbo de Ŝenhi-provinco, situas en la meza parto de Guanĝong-ebenaĵo. Sude de ĝi estas Kinling-montaro kaj norde Vejhe-rivero. Ĝi estas la centro de politiko, ekonomio kaj kulturo de la nomita provinco.

Hi-an, kiu en antikveco portis la nomon Ĉangan, estas unu el la 6 grandaj antikvaj ĉefurboj de Ĉinio. Inter ili ĝi estis la plej frue konstruita kaj plej longhistoria en nia lando. La laboranta popolo kreis tie brilan kulturon kaj postlasis

multajn kulturajn kaj artajn trezorojn kaj diversajn historiajn vizitindejojn, inter kiuj troviĝas Dajan-pagodo konstruita en 652 p. K. kaj Hiaŭjan-pagodo konstruita en 707 p. K. en Tang-dinastio, memorŝtonaro de Song-dinastio (1090 p. K.), la Sonorila Turo kaj la Tambura Turo konstruitaj en Ming-dinastio. En 1953, ĉe la vilaĝo Banpo en la orienta antaŭurbo de Hi-an estis trovita la restadejoj de klana komunumo en la neolitiko antaŭ pli ol 6,000 jaroj kaj ĝi nun



jam fariĝis parto de Banpo-muzeo. Kaj oni trovis tie ankaŭ la ruinon de Hingking-palaco de Tang-dinastio.

Hi-an estas urbo kun revolucia tradicio. Huang Ĉaŭ kaj Li Ziĉeng, gvidantoj de kamparanaj revolucioj okazintaj respektive en la dinastioj Tang kaj Ming ambaŭ fondis en la urbo sian regpotencon. En la periodo de la novdemokratia revolucio de nia lando, la popolo de Hi-an sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio faris longan heroan bataladon kontraŭ la reakciularo de Kuomintango. En decembro de 1936, tie okazis la mondska "Hi-an-a Evento" Siatempe Kamarado Ĝoŭ Enlaj kiel plenrajta delegito de la Komunista Partio de Ĉinio firme plenumis la principon de Prezidanto Maŭ kaj devigis Ĉiang Kajŝek ĉesigi la internan militon en la intertraktado, kaj dank' al tio formiĝis kaj disvolviĝis la Kontraŭjapana Nacia Unueca Fronto. Poste, la Komunista Partio de Ĉinio establis la "Interligejon de la Ruĝa Armeo en Hi-an", kiu poste estis alinomita "Oficejo de la Okavoja Armeo en Hi-an", kiu propagandis kaj plenumis la politikon de la Komunista Partio de Ĉinio pri la Kontraŭjapana Nacia Unueca Fronto, mobilizis junulojn kaj popolamasojn al la kontraŭjapana nasisava movado kaj sendis grandan nombron da revoluciaj kadroj al la liberigitaj regionoj.

Antaŭ la Liberiĝo, Hi-an estis ĉefstabejo de la kuomintanga reakciularo por regi la nordokcidentan popolon kaj fari militon kontraŭ la Komunista Partio de Ĉinio kaj la popolo; tiam ĝi estis tipa konsumo urbo. Tre postĝinta estis ĝia industria produktado, kaduka ĝia fizionomio kaj mizera la vivo de ĝia popolo.

En la 20-a de majo de 1949 Hi-an liberiĝis. Hodiaŭ, la urbo havas pli ol 1,600 fabrikojn kaj entreprenojn kun pli ol 400,000 industriaj laboristoj. En ĝi nove stariĝis industrioj de fero kaj ŝtalo, maŝinoj, elektro, konstruaj materialoj, kemiaĵoj, tekstilaĵoj kaj mezuraj instrumentoj. Dank' al disvastigo de la movado de lerno de Daking en industrio, la industria produktado ricevis rapidan disvolviĝon. Nun ĝi jam povas liveri grandtipajn kaj precizajn ilmaŝinojn, kompletojn da elektraj ekipaĵoj, maŝinojn por tekstilo kaj horloĝofabrikoj, aŭtojn, traktorojn k.a. Ankaŭ la produktado de ĉiutagaj bezonaĵoj ĉiam pli kreskas. La totala produktovaloro de ĝia industrio krekis pli-ol-40-oble kompare kun tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo.


Antaŭ la Liberiĝo, en Hi-an sin trovis nur du universitatoj kaj iom pli ol 30 mezlernejoj, dum nun funkcias 13 universitatoj, pli ol 230 mezlernejoj, 18 mezgradaj fakaj lernejoj kaj pli ol 1,000 elementaj lernejoj, kun sume 660,000 lernantoj, t.e. 7.7-oble pli multe kompare kun tiu de la komenca periodo post la Liberiĝo. Krome, nove starigitaj estis 28 kinejoj kaj teatroj, 16 kluboj, 1 filmostudio kaj 21 teatraj trupoj. Vigle disvolviĝas la kreado de la socialismaj literaturo kaj arto.

Antaŭ la Liberiĝo, 80% de la konstruaĵoj de la urbo estis el adobaj muroj kaj pajla tegmento. La hodiaŭa fizionomio de Hi-an fariĝis tute nova dank' al konstruado de fabrikoj, lernejoj, institucioj, magazenoj kaj loĝejoj, kies totala areo egalas 7-oblon de tiu antaŭ la Liberiĝo. Antaŭ la Liberiĝo la areo de la urbo estis nur 13.2 kvadrataj kilometroj, sed nun ĝi jam atingis pli ol 100 kvadratajn kilometrojn. La nuna Hi-an estas verdigita kaj ornamita per arboj kaj ĝardenoj.



Unu el la stratoj de Hi-an

Unu el la stratoj de
Hi-an antaŭ la Liberigo




Dajan-pagodo antaŭ la Liberigo





Dajan-pagodo kun alteco de 64 metroj kaj kvadrata bazo larĝa je 25 metroj en ĉiu flanko estas antikva majstra verko de la budhisma arkitekturo, karakterizita per majesteco kaj simpleco.



Sonorila Turo konstruita en 1382 p. K.



Budha statuo en Dajan-pagodo

Pengĉeng-aj porcelanaĵoj kun nova ĉarmo

La urbeto Pengĉeng de Hebej-provinco produktis faman specon de porcelanaĵoj jam en antikveco. Ĝia renomo en norda Ĉinio estis komparebla kun tiu de Gingdeĝen en suda Ĉinio en la historio de disvolvigo de ĉinaj porcelanaĵoj. En la periodo de la Nordaj Dinastioj antaŭ 1,400 jaroj, tiu loko jam komencis produkti celadonverdajn porcelanaĵojn, kaj en la Norda Song-dinastio (960-1127 p. K.) la tieaj bakfornoj, kiuj povis produkti artismajn simplajn kaj elegantajn porcelanaĵojn, jam fariĝis reprezentantoj de la nordaj popolaj bakfornoj.

La porcelanaĵoj de tiu loko en Song-dinastio karakteriziĝis ĉefe per siaj nigra kaj blanka koloroj en kontrasto kun engravuritaj kaj ferrustaj desegnoj kaj per ornamaĵoj de flava, nigrebruna kaj verda fajenco. Ili havis fortan lokan guston.

Post la Liberiĝo, sub la direktado de la principo starigita de Prezidanto Maŭ "utiligi la antikvajn en servo al la nuntempo" kaj "forigi la oldajn por elŝovi la novajn" oni rekomencis kaj kreis artismajn porcelanaĵojn kolorajn kaj belformajn kun tradiciaj karakterizaĵoj, kiel ekzemple porcelanaĵojn kolorfajencajn, kristalfajencajn kaj ajurajn, kaj tiujn kun engravuritaj kaj denskoloraj desegnoj.

La kolorfajencaj porcelanaĵoj tie produktitaj estas nova speco elvolvita surbaze de la tradicia porcelanaĵo

kun nigrajada fajenco. Dank' al apliko de malsamaj fajencmaterialoj, manieroj de fajencapliko kaj temperaturoj en bakado, riĉaj nuancoj kaj vejnoj povas esti kreitaj sur malsamaj facoj, linioj kaj lokoj, kaj tiamaniere produktiĝis gustoriĉaj vazoj kaj dekoraciaj tigroj, ĉevaloj kaj aliaj skulptaĵoj kun originala stilo kaj relative alta arta nivelo.

La fajencaĵoj kun gravuritaj desegnoj estas tradiciaj produktitaĵoj de tiu loko. La desegnoj estas faritaj laŭ la stilo de ĉina pentrarto en nigro kaj blanko aŭ ferrusta koloro, kaj ĉe iuj kazoj kun apliko de gravuritaj aŭ gratitaj desegnaj strekoj. Ili karakteriziĝas per fortaj koncizaj kaj elegantaj strekoj zorge kaj simetrie kunordigitaj. La kontrasto inter la koloroj estas forta, la temoj vastaj kaj la figuroj vivecaj, kaj ĉio ĉi tio formas la unikan karakterizaĵon de tiaj porcelanaĵoj.

Ankaŭ la tieaj porcelanaĵoj kun koloraj desegnaĵoj sur- aŭ sub-fajencaj aŭ kristala fajenco havas apartajn karakterizaĵojn. Inter la novaj specoj troviĝas smeraldaj porcelanaĵoj, kiuj estas elegantaj, brilaj kaj travideblaj kun fajenco plaĉa al la okuloj. Ili portas tiun nomon pro sia simileco al smeraldaĵo. Alia nova speco estas eburaj porcelanaĵoj, kiuj tre similas al tiu delikata kaj belkolora materialo. La porcelanaj vazoj kaj ornamaĵoj de tiu speco havas unikan guston.

La porcelanaĵoj produktitaj de Pengĉeng ne nur multe vendiĝas enlande, sed ankaŭ ĝuas sufiĉe altan ŝaton en eksterlanda merkato.

Laborejo por skulptado







Kaprokapa pokalo kun punktita fajenco

Malgrandaj Animaloj

Kokoj






Reveno de Rikoltado



Gorilo en nigraĝora fajenco




Laborejo por desegnado kaj glurado de koloraj desegnaĵoj



Laborejo por gravurado

Florvazo kun bildo de birdoj en umefloroj




Telero kun papilia paro
gravurita kaj kolorfajenca



Telero kun Tang-dinastia ĉevalo



Koko kaj Strigo



Fiŝhokado de

Teksto de Gang Ŝuli

Bildoj de Liang Jongmu




2. La katido vidas libelon flirtantan kaj volas ĝin kapti.



3. Sed lia klopodado montriĝis tute vana, dum la patrino sukcesis kapti ruĝan karpon.



6. La katido revenas al la hejmo sen kaptajo. La patrino lin admonas kun amo kaj pacienco.




7. "La fiŝhokantoj devas esti paciencaj kaj atente-
maj, alie ili ne povas sukcesi."


Katido




1. Estas printempa tago. Brilas la suno kaj ĉarmas buntaj floroj. La katido iras fiŝhoki kun la patrino.



4. La katido havas nenion en sia sitelo kaj sentas maltrankvilon kaj ĉagrenon.



5. Ĝi volas rekomenci fiŝhokadon, sed jen alflugas bela papilio.



8. La katido nun hokas absorbite, eĉ ne ĵetante rigardon al la libelo kaj papilio flirtantaj en la aero.



9. La katido finfine atingis sukceson dank' al korekto de sia eraro.



815 N



徐悲鸿画
北京中央美术学院

